

Klaus Schubert

## Aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj – esploro de la fontoj

### Resumo: Aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj – esploro de la fontoj

Planlingvojn oni kutimas klasi kiel *apriorajn*, *aposteriorajn* aŭ *miksitajn*. Kiel originon de tiu klasifiko oni ofte mencias superrigardan studon de Couturat kaj Leau de 1903, kelkfoje artikolon de Moch de 1897, pli malofte raporton de la Internacia Lingvistika Societo en Parizo en la jaroj ĉirkaŭ 1858 kaj tre malofte leteron de Kartezio de 1629. Krome, kelkaj sciencistoj opinias, ke la klasifiko kiel distingilon uzas nur la devenon de la vortoj aŭ morfemoj, dum aliaj konsideras la tutan konstruprincipon de la koncerna lingvosistemo. Ĉi tiu esplornoto analizas kaj la originon kaj la kriteriojn de la klasifiko, klopodas taksigi lokon en la pli larĝa tereno de la lingvistiko kaj trovas tre malrapidan procedon de terminiĝo, pro kiu oni eble ne povas klare nomi unusolan aŭtoron de la klasifiko.

### Abstract: *A priori* and *a posteriori* planned languages – an investigation into the sources

Planned languages are usually classified as either *a priori*, *a posteriori* or *mixed*. This classification is attributed often to a 1903 reference work by Couturat and Leau, sometimes to an 1897 article by Moch, more rarely to the Société internationale de Linguistique, active around 1858 in Paris, and at times to a letter by Descartes, dated 1629. In addition, the classification is employed by some researchers based on the origin of the lexicon only and by others based on the entire construction principle of the language system. This research note investigates the origins and the criteria of the classification and attempts to place it in the wider context of linguistics. It is contended that the process of coining the terms comprising the classification happened very slowly, meaning that it may not be possible to identify a single author of the classification.

*Mi dediĉas ĉi tiun artikolon al la memoro de la renoma interlingvisto Otto Back, kiu forpasis en oktobro 2018.*

## 1 Pri la tipologio de la planlingvoj

Ekzistas pluraj centoj da planlingvoj. Back (1996: 884) nombras proksimume 300 sistemojn, kiuj estas dokumentitaj pli-malpli komplete.<sup>1</sup> Malkiel Back, Duliĉenko (1990b) inkluzivigas ankaŭ pazigrafiojn, nekompletajn skizojn kaj nurajn menciojn kaj tiel atingas nombron de pli ol 900. Post la publikaĵoj de Back kaj Duliĉenko aperis novaj planlingvoj, precipe en la Interreto. La nombro de planlingvoj estas tiel alta, ke la interlingvistiko ilin ordigas kaj klasas. Vaste uzataj estas du tipigoj. (Back 1996: 883 mencias pliajn eblajn.) La unua estas la soci pragmatika klasifiko de Blanke, kiu grupigas la planlingvosistemojn laŭ la kriterio de komunika realigo (Blanke 1985:

---

<sup>1</sup> Originalo: Ĉi tiun esplornoton mi tradukis de versio aperinta en la germana lingvo (Schubert 2018).

107–108 kaj tabelo 2, pli detale Blanke 2001/2006: 64–71). La dua klasifiko estas pli malnova. Ĝi taksas ĉu la elementoj de la koncerna lingvo estas *inventitaj* aŭ *pruntitaj*<sup>2</sup> kaj laŭ tio distingas *apriorajn*, *aposteriorajn* kaj *miksitajn* planlingvojn. Ĉi tiu esplornoto temu pri ĉi-lastata klasifiko. Oni ĝin vaste uzas kaj ofte ankaŭ donas klarigojn kaj fontindikojn. Tamen kaj la klarigoj kaj la fontindikoj konsiderinde varias. Mi tial jen klopodas esplori, de kiu do originas la klasifiko (sekcio 2) kaj kio estas ĝia ekzakta enhavo (sekcio 3).

Antaŭ ol pli detale konsideri la klasifikon, mi precizigu ĝian objekton. Temas pri *planlingvoj*. Tiun terminon enkondukas Wüster en sia disertaĵo (germane: *Plansprache*; Wüster 1931/1966: 294, 324 kaj multloke), en la komenco simple uzante ĝin sen difino. En la dua eldono de sia libro, aperanta 35 jarojn post la unua, li povas konstati, ke lia termino estas ĝenerale akceptita (Wüster 1931/1966: 426). Wüster kreas ĝin kiel germanan ekvivalenton de la anglalingva esprimo *constructed language* ‘konstruita lingvo’ uzita de Jespersen (1928: 3; Wüster 1955: 210; vidu ankaŭ Blanke 1996b/2006: 167). Post tio oni ankaŭ repruntis la terminon de Wüster en la anglan (*planned language*) (vidu Back 1996: 881).

Tradicie la interlingvistiko difinas planlingvojn kiel konscie kreitajn lingvosistemojn por internacia aŭ interreta komunikado (Blanke 1985: 53; Back 1996: 881). Tamen pli novaj konceptoj estas formulitaj iomete alie (ekz. Blanke 2004: 1563) kaj tiu diferenceto por nia esploro gravas. La ĉi-sekvaj konsideroj pri la klasifiko de la planlingvoj kondukos nin almenaŭ ĝis en la 17-an jarcenton. En tiu tempo oni kreas lingvosistemojn precipe kiel heŭristikajn instrumentojn de la filozofio. Kelkaj el iliaj aŭtoroj ja ankaŭ pensas pri internacia komunikado (Neis 2009: 803–804), sed la plejmulto evoluigas sistemojn, kiuj por tiu celo nek taŭgas nek taŭgu. Tiaj lingvosistemoj kutime nomiĝas *filozofiaj* aŭ *universalaj lingvoj*. Striktasence ili ne plenumas la difinon de Blanke kaj Back. Tamen du jardekojn post sia difino de 1985 Blanke konstatas, ke en la lingvistika literaturo oni pli kaj pli klasas universalajn lingvojn kiel specon de planlingvoj (Blanke 2004: 1563; same Suchowolec 2018: 59; sed ankaŭ jam Wüster 1931/1966: 324). En ĉi tiu esplornoto mi aliĝas al tiu pli vasta kompreno, des pli ĉar ankaŭ multaj el la aŭtoroj rolantaj en mia esploro faras same.

La interlingvistoj konsentas pri tio, ke la funkcio de la tipologia klasifiko estas grupigi lingvosistemojn sendepende de ilia fakta uzo. Tial por la nuna esploro ne gravas, ĉu sistemo laŭ la socipragmatika tipigo de Blanke apartenas al la planlingvaj projektoj, la semiplanlingvoj aŭ la striktasencaj planlingvoj (Blanke 1985: 107–108 kaj tabelo 2, 2001/2006: 64–71).

## 2 Pri la kreinto

La jen diskutatan distingon inter *aprioraj* kaj *aposterioraj* planlingvoj nuntempe uzas multaj sciencistoj. Kelkaj situigas inter la du aldonan grupon de *miksitaj* aŭ *aprioraj-aposterioraj* planlingvoj, aliaj distingas forte kaj malforte apriorajn aŭ alimaniere variigas la klasifikon.

Kelkaj sciencistoj uzas la klasifikon kvazaŭ ĝi estus baza lingvistika scio bezonanta nek klarigon nek fontindikon (tiel faras Jespersen 1928; Kamman 1942: 180; Martinet 1946; Manders

<sup>2</sup> Inventita–pruntita: Tiun konceptoparon oni ankaŭ nomas *artefarita–natura*, *konstruita–natura*, *konscia–spontanea* aŭ simile. Blanke detale diskutas la ideojn esprimitajn en tiuj epitetoj (Blanke 1985: 20, 26–35).

1947: 65–66; Eco 1993/1994: 15). Kelkaj aŭtoroj eksplicite eldiras tiun sintenon, skribante (per tiuj aŭ similaj vortoj) ke ‘kiel konate’ oni tiel klasas la planlingvojn (Lichtgejm 1982: 50; Duliĉenko 1990a: 22). Aliaj interlingvistoj mem enkondukas la terminojn klarigante ilin per propraj vortoj sen referenco al fonto (tiel faras Drezen 1931: 28; Wüster 1931/1966: 324–325; Verloren van Themaat 1962; Sakaguchi 1983: 255–257, 1997: 296–297 n. 5, 9; Noordegraaf 1988: 137; Strasser 1989: 207; Harrison 1992/2002; Davies 1999/2007: 111; Klare 2010: 10). Kelkaj sciencistoj ja referencas al fonto, sed per tio ne diras, ke ili konsideras ties aŭtorojn kreintoj de la klasifiko, sed nur ke ili ĝin tie trovis. Tiaj publikaĵoj ofte referencas al fundamenta verko (ekz. Blanke 1985; Large 1985; Sakaguchi 1998) aŭ al iu ajn hazarde disponebla publikaĵo. Tiajn referencojn mi ĉi tie ne esploras. Menciindas tamen, ke foje eĉ aŭtoroj publikigantaj siajn studojn en reputaciaj verkoj apogas sian terminuzon sur tiaj hazarde elektitaj duavicaj fontoj (ekz. Vikør 2004: 331, kiu referencas al Sakaguchi 1987).

## 2.1 Couturat kaj Leau

Studo de unua rango estas la *Histoire de la langue universelle* ‘Historio de la universala lingvo’ de Louis Couturat (1868–1914) kaj Léopold Leau (1868–1943) (Couturat/Leau 1903).<sup>3</sup> Tiu detale kaj zorge ellaborita superrigardo estas parto de la laboro farita prepare al la kunsidoj en 1907 de la komitato de la *Délégation pour l’adoption d’une langue auxiliaire internationale* ‘Delegacio por alprenado de internacia helplingvo’<sup>4</sup> iniciatita de la du aŭtoroj. La celo de la komitato estas elekti la plej bonan inter la planlingvoj publikigitaj kaj dum la kunsidoj persone prezentitaj fare de siaj aŭtoroj aŭ ties reprezentantoj. Sed anstataŭ elekti, la komitato decidis favore al reformo de la plej ŝancohava el la konsiderataj planlingvoj, Esperanto, kaj akceptas la lingvoplanon submetitan dum la kunsidoj sub la pseŭdonimo Ido (kies aŭtoroj, kiel oni scias hodiaŭ, sin kaŝas inter la ĉeestantoj). La decidon de la komitato sekvas multjara arda disputo kaj skismo de la Esperanto-movado en Esperanto-plimulton kaj Ido-malplimulton.<sup>5</sup>

Couturat kaj Leau enkondukas la konceptan distingon per la jenaj vortoj:

Il y a, d’une part, des projets qui, pour des raisons diverses, ne tiennent aucun compte des langues naturelles, et qui sont des langues originales, construites de toutes pièces: nous les appelons *systèmes a priori*. Il y a, d’autre part, des projets qui, prenant pour modèle les langues naturelles (particulièrement les langues européennes), s’efforcent de les imiter et leur empruntent presque tous leurs éléments: nous les appelons *systèmes a posteriori*. Entre ces deux groupes, radicalement distincts par leurs tendances, il existe un certain nombre de projets qui s’inspirent à la fois des

<sup>3</sup> Couturat kaj Leau: La monografio *Histoire de la langue universelle* aperas en 1903 en la unua kaj en 1907 en la dua eldono (Couturat/Leau 1903). La daŭriga volumo *Les nouvelles langues internationales* ‘La novaj internaciaj lingvoj’ aperas en 1907 (Couturat/Leau 1907). Ekzistas represo de ambaŭ libroj kune en unu volumo (Couturat/Leau 1979). La originalaj eldonoj de 1903 kaj 1907 estas elŝuteblaj kune en unu dosiero (Couturat/Leau 1903+1907).

<sup>4</sup> Delegacio: Tiun organizaĵon oni tre multe diskutis kaj diskutis en Esperanto, sed ĝian franclingvan nomon oni kutimas traduki diversmaniere.

<sup>5</sup> Delegacio: Detalajn raportojn kun pli ampleksa fontaro donas inter aliaj Waringhien (1980: 137–154), Blanke (1985: 185–187), Kuznecov (1987: 114–135) kaj Schubert (1993: 345–346, 2009: 113 n. 8). – En la nuntempa interlingvistiko oni konvinkigis, ke la aŭtoro de la baza teoria ideo kaj do la ĉefaŭtoro de Ido estas Couturat (Blanke 2015: 201), dum Louis de Beaufront, kiu figuros dufoje pli poste en ĉi tiu esplornoto, estas la verkinto de la Ido-broŝuro prezentita al la komitato (Blanke 1985: 187). Analizinte ampleksan korespondajaron Waringhien konstatas, ke krom Couturat kaj Beaufront ankaŭ Alfred Michaux (1859–1937) ludas gravan rolon (Waringhien 1980: 137–154).

deux principes opposés, et qui offrent un mélange des caractères propres aux deux groupes (ce sont principalement le *Volapük* et ses dérivés); nous les appelons pour cette raison *systèmes mixtes* [...].

(Couturat/Leau 1903: XXVII–XXVIII)

‘Unuflanke ekzistas projektoj, kiuj pro diversaj kaŭzoj tute ne konsideras naturajn lingvojn kaj tial estas memstaraj lingvoj komplete novkonstruitaj – ilin ni nomas *aprioraj sistemoj*. Aliflanke ekzistas projektoj, kiuj prenas kiel modelojn naturajn lingvojn (precipe la eŭropajn lingvojn) kaj klopodas imiti ilin, pruntante preskaŭ ĉiujn siajn elementojn – ilin ni nomas *aposterioraj sistemoj*. Inter tiuj du grupoj, kiuj laŭ sia ĝenerala strukturo estas fundamente malsamaj unu de la alia, ekzistas certa nombro da projektoj, kiuj sekvas ambaŭ kontraŭajn principojn samtempe kaj kiuj konsistas el miksaĵo de la trajtoj de ambaŭ grupoj (ĉefe *Volapük* kaj sistemoj de ĝi derivitaj) – tiujn ni nomas *miksitaj sistemoj* [...].’<sup>6</sup>

Multaj sciencistoj mencias tiun difinon. Ni rigardu ĝin detale kaj notu, per kiuj vortoj ili tion faras.

Ne malmultaj aŭtoroj uzas la terminojn *apriora*, *aposteriora* kaj ofte ankaŭ *miksita* indikante kiel fonton Couturat kaj Leau (1903) (tiel faras Mallet 1904: 79; Jacob 1947: 90; Savatovsky 1989: 43–44; Back 1996: 883; Jeandillou 1997; Calero Vaquera 1999: 11, 27; Gardt 1999: 136; Neis 2009: 807; Meyer 2014: 29). Clark klarigas la klasifikon per propraj vortoj, sed kelkajn liniojn poste li mencias Couturat kaj Leau (1903) kiel fonton de la sekvanta priskribo de diversaj planlingvoj, tiel ke oni rajtas supozi, ke li ĉerpas el ilia verko ankaŭ la klasifikon (Clark 1907: 77–78). Simile ankaŭ en la publikajoj de aliaj aŭtoroj ne ĉiam estas tute evidente, kiujn fontojn ili uzas. Krome kelkaj aŭtoroj ne klare esprimas, ĉu ili konsideras la libron de Couturat kaj Leau kiel fonton unuavican aŭ duavican. Ekzemple Böhmer skribas: “[...] die von Couturat & Léau (1907) propagierte Unterscheidung zwischen *apriorischen* und *aposteriorischen* Sprachen [...]”<sup>7</sup> (Böhmer 2001: 89) ‘[...] la distingo inter aprioraj kaj aposterioraj lingvoj diskonigita de Couturat & Léau (1907) [...]’ kaj aldone referencas al Blanke (1985: 100–101). Duliĉenko (1984: 23) mencias Couturat kaj Leau (1903, 1907) kiel la unuajn ellaborantojn de la klasifiko, kio ja ne nepre implicas, ke ili ĝin kreis. Jacob havas interesan sintenon: Rilate la klasifikon en apriorajn, aposteriorajn kaj miksitajn sistemojn li referencas al Couturat kaj Leau, tamen li ne citas ilian difinon sed la vortojn de Guérard (1922: 83):

Professor Guérard has given a good definition of these two terms in his short history, “an a priori language is one which is based on some logical conception[,] without any reference to existing forms; an a posteriori language is one that derives all its elements from natural tongues.”

(Jacob 1947: 90)

‘En sia *Short History* ‘Mallonga historio’ profesoro Guérard donas bonan difinon de la du terminoj: “apriora lingvo estas lingvo bazita sur ia logika koncepto sen uzo de ekzistantaj formoj; aposteriora lingvo estas lingvo, kiu pruntas ĉiujn siajn elementojn de naturaj lingvoj.”

Ne estas evidente, kial Jacob ne citas Couturat kaj Leau mem.

<sup>6</sup> Tradukoj: Pro helpo pri la traduko de la francaj citaĵoj mi dankas al Franziska Heidrich, Hildesheim. La anglaj kaj rusaj aperas kun miaj tradukoj.

<sup>7</sup> Léopold Leau: La familia nomo en la fontoj aperas en jen tia, jen tia literumo. *Leau* estas konsiderinde pli ofta ol *Léau*. En la pripersona katalogero de la Franca Nacia Biblioteko ĝi estas *Leau* (Bibliothèque 2018ĉ). En la propraj publikajoj de Leau, kiujn mi konas, la nomoj de personoj aperas en majuskloj aŭ majuskletoj, ĉe kiuj la franca ortografio permesas ellason de eventuala akcento.

La superrigardo de Couturat kaj Leau (1903) sendube estas grava kaj ofte uzata fonto. Tiom, kiom mi konas la interlingvistikan literaturon, oni multe malpli atentis la fakton, ke Couturat uzas la terminojn jam du jarojn pli frue en libro pri la logiko de Leibniz, en ĉapitro pri la studoj de Leibniz kaj liaj antaŭuloj pri universala lingvo:

Mais bientôt il s'aperçoit que le problème est moins simple et moins facile qu'il ne le croyait d'abord; et, au lieu de créer *a priori* et de toutes pièces une langue purement conventionnelle, il adopte une méthode *a posteriori*, moins arbitraire et moins téméraire. Il prendra pour point de départ les langues vivantes, et il en extraira par l'analyse logique, d'une part, les idées simples à exprimer et à combiner et d'autre part, une *grammaire rationnelle*, en simplifiant, en régularisant et en fondant ensemble les grammaires des différentes langues. (Couturat 1901: 63–64)

‘Sed baldaŭ montriĝis, ke la problemo estis malpli simpla kaj malpli facila, ol li komence supozis; kaj, anstataŭ *apriora* krei komplete novevoluigitan lingvon, li aplikis *aposterioran* metodon, malpli arbitran kaj malpli riskeman. Kiel elirpunkton li prenis vivantaj lingvojn kaj unuflanke per logika analizo tiris el ili la simplajn ideojn esprimendajn kaj kombinendajn, kaj aliflanke *racian gramatikon*, per tio ke li faciligis, unuecigis kaj kunfandis la gramatikojn de la diversaj lingvoj.’

Tie Couturat uzas la vortojn *apriora* kaj *aposteriora* en maniero, kiu, ŝajnas al mi, por esploranto de Leibniz nature glitas en la fluon de lia faklingva esprimado, tiel ke ili ĉi tie ne nepre estas intencitaj kiel terminoj. Tekstero, en kiu oni povas observi, kiel tia esprimo en simila maniero ŝoviĝas en la verkofluon sen esti intence ĉerpita el difinanta fonto, troviĝas ĉe Slaughter. Tiu aŭtoro uzas la vorton *apriora* por universalaj lingvoj, laŭ mia impresio sen ke estas sen dubo decidebla, ĉu estas ŝia propra vortelektado kadre de ŝia rezonado pri filozofiaj konceptosistemoj aŭ ĉu ŝi prenas la vorton el la libro de Couturat kaj Leau (1903), kiun ŝi citas aliloke en sia libro.

With the *Ars signorum*, Dalgarno had adopted Wilkins' idea of creating a language scheme on the basis of a classification of simple notions. To follow these principles meant to change significantly the direction taken by previous artificial language schemes. Dalgarno's new scheme does not begin with existing root words as did former ones: it begins with concepts and from these concepts artificial and philosophical words are created. These projects can be described as *a priori* ones: an inventory of non-linguistic items, viz. notions and things, will be set out in advance; the language itself will systematically reproduce this inventory in the linguistic form of the new words. A philosophical language, as Dalgarno understood it, presupposed an analysis of the order of nature. (Slaughter 1982: 143)

‘En la *Ars signorum* Dalgarno transprenis la ideon de Wilkins krei lingvosistemon surbaze de klasifiko de simplaj nocioj. Sekvi tiujn principojn signifis grave ŝanĝi la direkton iritan de pli fruaj artefaritaj lingvosistemoj. Malkiel pli fruaj sistemoj, la nova sistemo de Dalgarno ne estas konstruita sur ekzistantaj radikoj: Ĝiaj bazaj elementoj estas konceptoj, kaj de tiuj konceptoj estas konstruitaj artefaritaj kaj filozofiaj vortoj. Ĉi tiujn projektojn eblas nomi aprioraj: Oni unue difinas aron da nelingvaj elementoj, do nociojn kaj aĵojn. La lingvo mem simple reprezentas tiun konceptaron en la lingva formo de la novaj vortoj. Filozofia lingvo, kiel Dalgarno komprenis ĝin, premisis analizon de la ordo de la naturo.’

Couturat kaj Slaughter science analizas univeralajn lingvojn. Sendepende de tio, ĉu iliaj vortoj estas intencitaj kiel terminoj, ili ĉiukaze estas eroj de la lingvistika debato. Grandan paŝon for de tio kaj ankaŭ en la tempo pli frua ol la plej multaj el la aŭtoroj diskutotaj sube estas simila vortuzo, kiu tutcerte ne estas legenda kiel termino, sed kiu povus inspiri postajn, pli lingvistike

orientitajn legantojn al terminkreado. En dialogforma politika-filozofia libro de la politikisto, verkisto kaj filozofo Joseph de Maistre (1753–1821) ni legas en ĉapitro, kie temas pri “*langues nouvelles ou inventées*” (Maistre 1821/1854: 107) ‘*novaj aŭ inventitaj lingvoj*’ (vidu ankaŭ Moret 2004):

En lisant les métaphysiciens modernes, vous aurez rencontré des raisonnements à perte de vue sur l’importance des signes et sur les avantages d’une langue philosophique (comme ils disent) qui serait créée *à priori*, ou perfectionnée par des philosophes. (Maistre 1821/1854: 109)

‘Legante la modernajn metafizikistojn vi trovos grandnombrajn rezonadojn pri la graveco de signoj kaj la avantaĝoj de filozofia lingvo (kiel ili ĝin nomas) de filozofoj *apriorie* kreita aŭ perfektigita.’

Sed ni revenu al Couturat. En la loko ĵus citita Couturat emfazas multe pli klare ol en sia posta verko kun Leau, ke li taksas ne nur la devenon de la vortoj, sed la kompletan konstruprincipon de la koncerna planlingvo. Kelkajn paĝojn poste tio fariĝas eĉ pli evidenta:

A cette méthode de construction *a priori* des particules Leibniz joignait, comme ailleurs, la méthode *a posteriori*, en énumérant les diverses particules latines, es les analysant, en les définissant et en les classant [...]. (Couturat 1901: 72)

‘Tiun *aprioran* metodon de la konstruado de la funkcivortoj Leibniz kompletigis, samkiel en aliaj okazoj, per la *aposteriora* metodo, listigante la funkcivortojn de la latina kaj ilin analizante, difinante kaj klasante [...].’

Se mi sufiĉe atente legis la libron de Couturat, la distingo inter apriora kaj aposteriora lingvo-konstruo aperas nur en la du ĉi tie cititaj lokoj. Ĉi tiuj mencioj ne estas la origino de la klasifiko, kiun ni serĉas.

## 2.2 Moch

La superrigardo de Couturat kaj Leau (1903) estas la supozeble plej grava teoria fonto koncerne la tripartigon en apriorajn, aposteriorajn kaj miksitajn planlingvosistemojn. La du aŭtoroj tamen ne mem kreis la klasifikon, sed referencas al Gaston Moch (1859–1935):

Cette classification, ainsi que les appellations *a priori*, *a posteriori*, nous a été suggérée par le *Rapport sur la question de la langue internationale*, présenté par M. Gaston MOCH au 8<sup>e</sup> Congrès universel de la Paix (1897). Cf. le rapport du Comité de la *Société de Linguistique* (Section I, ch. XI). (Couturat/Leau 1903: XXVIII n. 1)

‘Tiun klasifikon samkiel la terminojn *apriora* kaj *aposteriora* ni prenas el la *Rapport sur la question de la langue internationale* ‘Raporto pri la problemo de la internacia lingvo’ kiun s-ro Gaston MOCH prezentis al la 8-a *Universala Kongreso de la Paco* (1897). Vidu la raporton de la Komitato de la *Société de Linguistique* ‘Lingvistika Societo’ (sekcio I, ĉ. XI).’

Ne klariĝas el tiu piednoto, ĉu Couturat jam konas la raporton de Moch, kiam li verkas sian libron pri Leibniz (Couturat 1901).

El la interlingvistoj, kiuj mem legis la libron de Couturat kaj Leau (1903), multaj transprenas tiun rimarkigon kaj nomas kiel fonton de la klasifiko Couturat kaj Leau kune kun Moch aŭ nur Moch. Tamen estas notinde, ke multaj el tiuj aŭtoroj ne vere referencas al la raporto

(Moch 1897a) menciita en la noto de Couturat kaj Leau, sed al alia publikaĵo de Moch el la sama jaro:

Moch, Gaston (1897c): *La question de la langue internationale et sa solution par l'Esperanto*. Paris: Giard & Brière

Tiun publikaĵon mencias inter aliaj Blanke (1985: 100, bibl. 313), Sakaguchi (1998: 97 n. 419, bibl. 456), Schmidt-Radefeldt (1998: 680, bibl. 686) kaj Fiedler (1999: 26, bibl. 375). Oni rajtas supozi, ke kelkaj sciencistoj transprenas la fontindikon el ĉi tiuj aŭ aliaj publikaĵoj sen mem rigardi la fonton. Mi konfesas, ke en pli fruaj publikaĵoj mi faras same (ekz. Schubert 2009: 133 n. 44, bibl. 146, 2011a: 50, bibl. 59, 2011b: 376 n. 18, bibl. 389). Krome ekzistas publikaĵoj, kies aŭtoroj nomas kiel fontojn kaj Couturat/Leau kaj Moch, sed donas bibliografiajn detalojn nur pri Couturat kaj Leau (ekz. Lafargue 1904: 52; Monnerot-Dumaine 1960: 29; Kuznecov 1976: 61, 1991: 175), tiel ke eblas konjekti, ke la artikolon de Moch ili ne vidis.<sup>8</sup>

Laŭ mia scio de la koncerna literaturo la memstara publikaĵo de Moch estas la plej ofte menciata versio de lia artikolo. En noto sur la unua paĝo (Moch 1897c: 5 n. 1) oni tamen povas legi, ke ĝi ne estas la unua versio, sed apartaĵo de artikolo samjare aperinta en revuo:

Moch, Gaston (1897b): “La question de la langue internationale et sa solution par l'Esperanto.” *Revue internationale de sociologie* 5: 249–295

En ambaŭ versioj de la artikolo fakte troveblas la terminoj *apriora* kaj *aposteriora*:

NOTE A. – *Sur les principaus systèmes de language internationale* [...]

Dans le cours des deus derniers siècles, on compte plus de 150 projets de langue internationale, dont 30 au moins depuis le volapük. Leur plus grand nombre ne constitue que des essais de pasigrafie plus ou moins ingénieux et, il faut en convenir aussi, plus ou moins bizarres. Tels sont tous ceus de la première période.

Les tentatives plus récentes comprennent des essais de langue proprement dites, les unes *a priori*, les autres *a posteriori*. Mais il est important de ne pas perdre de vue qu'il n'y a en réalité que deus langues artificielles entièrement achevées et essayées pratiquement: le volapük et l'esperanto.

(Moch 1897b: 288 Note A, 1897c: 44 Note A)<sup>9</sup>

'NOTO A. – *Pri la ĉefaj sistemoj de internaciaj lingvoj* [...]

Dum la lastaj du jarcentoj aperis pli ol 150 projektoj de internaciaj lingvoj, inter ili minimume 30 post Volapük. La plej multaj el ili ne estas pli ol pli-malpli geniaj kaj, konsentite, pli-malpli bizaraj skizoj de pazigrafioj. Al tiu grupo apartenas ĉiuj el la unua periodo.

Al la pli novaj provoj apartenas skizojn de veraj lingvoj, unuj *aprioraj*, la aliaj *aposterioraj*. Tamen gravas ne forgesi, ke fakte ekzistas nur du artefaritaj lingvoj, kiuj estas komplete ellaboritaj kaj praktike provitaj, Volapük kaj Esperanto.'

---

<sup>8</sup> Moch kiel fonto: Ankaŭ laŭ Guérard (1922: 82) Moch proponas la klasifikon kaj Couturat kaj Leau ĝin transprenas. Tamen Guérard ne donas bibliografiajn detalojn, tiel ke ne estas evidente, kiun publikaĵon de Moch li celas kaj ĉu entute li vidis iun el la tekstoj de Moch.

<sup>9</sup> Ortografio: Moch uzas reformitan ortografion de la franca lingvo.

Noto A sekvas la ĉefan tekston de la artikolo kiel suplemento. Kie mi en la citaĵo metas signon de ellaso, en ambaŭ versioj troviĝas indiko al piednoto, kies unua frazo tekstas:

Les éléments de cette note sont dûs en grande partie à M. de Beaufront. [...]

(Moch 1897b: 288 Note A n. 1, 1897c: 44 Note A n. 1)

‘La enhavo de ĉi tiu noto grandparte originas de s-ro de Beaufront. [...]’

Markizo Louis de Beaufront (1855–1935) estas persono de ŝanĝa reputacio. Interalie la zorge dokumentita biografia noto de Jossinet (1998) montras, ke nek lia nomo nek lia nobela titolo estas veraj. Moch kaj Beaufront konas unu la alian. En la jaroj de la ĉi-koncerna artikolo ili ambaŭ aktivas en la Esperanto-movado. En 1907 ili partoprenas la kunsidojn de la komitato de la Delegacio, Moch kiel anstataŭanto de komitatano, Beaufront kiel prezentanto kaj advokato de Esperanto kaj kaŝa kunaŭtoro de Ido. Post la skismo de 1907 ambaŭ engaĝiĝas en la Ido-movado.

Noto A de Moch en ambaŭ versioj de la artikolo ampleksas sep paĝojn (Moch 1897b: 288–294 Note A, 1897c: 44–50 Note A). Ĉar la indiko al la piednoto pri Beaufront estas metita al la fino de la titolo de la noto kaj do devus rilati al la kompleta seppaĝa teksto de la noto, mi ĝin komprenas tiel, ke granda parto de la informoj pri diversaj planlingvoj, enhavataj en la noto, venas de Beaufront, sed ne, ke ĝuste la klasifiko menciata en la komenco de la noto originas de li.

Unue tamen ni konsideru la enhavon de Noto A. Moch tie uzas – ne en la ĉefteksto, sed en suplemento de la artikolo – la du terminojn (pri miksitaj lingvoj li ne parolas). Sed la terminojn li nek enkondukas nek difinas, sed premisas ilin kiel konatan fakton. Tio do ne povas esti la origina fonto de la klasifiko, kiun ni ĉi tie serĉas. Kiel ni vidis supre, Couturat kaj Leau (1903: XXVIII n. 1) tute ne nomas kiel fonton tiun artikolon, sed la *Rapport sur la question de la langue internationale* ‘Raporton pri la problemo de internacia lingvo’, kiun Moch en 1897 submetas al la 8-a Universala Kongreso de la Paco.

Do ni klopodu trovi la kongresan raporton de Moch. Tiom, kiom mia esploro permesas juĝi, la unua sciencisto post Couturat kaj Leau, kiu ne nur mencias la raporton, sed fakte citas el ĝi, estas Marlaud. Ŝi mencias la klasifikon per la jenaj vortoj:

La littérature sur les LA [...] s’accorde sur l’identification de deux grandes familles, les projets *a priori* d’une part, et les projets *a posteriori*. Ces appellations remontent à Gaston Moch et à son *Rapport sur la question de la langue internationale* présenté au VIII<sup>e</sup> Congrès international de la paix [...]. (Marlaud 2013: 86–87)<sup>10</sup>

‘La literaturo pri la internaciaj lingvoj [...] konsente identigas du grandajn familiojn: unuflanke la *apriorajn* projektojn kaj aliflanke la *aposteriorajn* projektojn. Tiuj terminoj devenas de Gaston Moch kaj lia *Rapport sur la question de la langue internationale* ‘Raporto pri la problemo de internacia lingvo’ prezentita al la 8-a Universala Kongreso de la Paco [...]’

La teksteroj cititaj de Marlaud el la raporto de Moch estas partoj de la pli longa citaĵo, kiun mi sube prenas el la originala fonto. En la supre cititaj frazoj el la artikolo de Marlaud la unua signo de ellaso anstataŭas referencon al ĝeneralaj fontoj pri planlingvoj kaj la dua indikon al piednoto,

<sup>10</sup> Marlaud: LA = langues artificielles ‘artefaritaj lingvoj’.



en kiu Marlaud sciigas pri la loko kaj la datoj de la kongreso. La bibliografiaj detaloj de Marlaud tekstas jene:

Moch G. (1897), VIII<sup>e</sup> Congrès universel de la paix tenu à Hambourg du 12 au 16 août 1897: Rapport sur la question de la langue internationale, Paris, s.n. (Marlaud 2013: 115)

La aktoj de la kongreso enhavas en la sesa sesio sekcion “VI. Choix d’une langue internationale” ‘VI. Elektro de internacia lingvo’. Tie oni mencias du raportojn pri la temo, inter ili tiun de Moch kaj proponon de rezolucio enhavatan en lia raporto (Bulletin 1897: 79–80). Tamen la teksto de la raporto mem ne aperas en la aktoj kaj ne estas ajna mencio de la klasifiko de planlingvoj.

Nian serĉon de la raporto de Moch ne vere helpas la bibliografiaj detaloj ĉe Marlaud. En la reta katalogo de la Franca Nacia Biblioteko oni tamen trovas la jenon:

VIII<sup>e</sup> Congrès universel de la Paix. rapport sur la question de la langue internationale. [Signé : Gaston Moch.]

Description matérielle : In-8° , 18 p.

Édition : (S. l. n. d.)

Auteur du texte : Gaston Moch (1859-1935)

Éditeur scientifique : Congrès universel de la paix (08 ; 1897 ; Hambourg, Allemagne)

(Bibliothèque 2018a)

Tio povas esti la ekzemplero, kiun Marlaud citas, eĉ se la kataloga informo ne konfirmas la lokon de publikigo, kiun Marlaud mencias (Parizo).<sup>11</sup> Mi povis konsulti kopion de alia ekzemplero, kiu ŝajnas esti migrinta el la Internacia Buroo de la Paco en Berno al la arkivo de la Ligo de Nacioj en Ĝenevo kaj de tie en la arkivon de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, kie ĝi nuntempe troviĝas.<sup>12</sup> En ĝi la koncernaj frazoj tekstas jene:

11. – Quant aux langues proprement dites, c’est-à-dire aux systèmes permettant la conversation aussi bien que la communication par écrit, il en a été proposé une trentaine depuis quelque quarante ans. Mais, sur ce nombre, il convient d’éliminer par principe celles qui sont a priori, c’est-à-dire qui sont été forgées de toutes pièces par leurs inventeurs, sans rien emprunter aux langues naturelles, pas même les mots qui dès maintenant sont compris par tous les peuples de monde, comme théâtre, téléphone, etc. [...]

12. – Parmi les langues artificielles a posteriori, c’est-à-dire celles qui empruntent leurs matériaux aux langues naturelles, deux seulement, jusqu’ici, ont été achevées par leurs auteurs, et ont donc pu être soumises à l’épreuve de la pratique: le volapuk en l’esperanto.

(ambaŭ citaĵoj Moch 1897a: 6)

‘11. – En la lastaj ĉ. 40 jaroj oni proponis proksimume 30 verajn lingvojn, t. e. lingvojn, kiuj permesas kaj parolan kaj skriban komunikadon. De tiu nombro tamen principe necesas subtrahi la apriorajn, do tiujn, kiuj estis fundamente kreitaj de siaj inventintoj sen ajnaj pruntoj el naturaj

---

<sup>11</sup> Moch: Krom Marlaud ankaŭ Meyer (2014: 22, bibl. 342) donas bibliografiajn detalojn, kiuj, samkiel la katalogo de la Franca Nacia Biblioteko, enhavas la titolon de la kongreso kaj tiun de la raporto unu post la alia. Tamen Meyer ne rilatigas la raporton de Moch al la konceptoparo *apriora*–*aposteriora*.

<sup>12</sup> Raporto: Pro la sukcesa spurado de la raporto de Moch mi dankas al mia doktoriganto Mélanie Maradan, Ĝenevo, al la arkivisto de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo, Jacques Oberson, kaj al la estro de la planlingva kolekto de la Aŭstra Nacia Biblioteko en Vieno, Bernhard Tuidler.

lingvoj, eĉ sen la vortoj, kiujn nuntempe komprenas ĉiuj popoloj de la mondo, kiel teatro, telefono ktp. [...]

12. – El inter la aposterioraj artefaritaj lingvoj, t. e. el inter tiuj, kiuj pruntas sian materialon el naturaj lingvoj, ĝis nun nur du estis komplete ellaboritaj de siaj aŭtoroj kaj tial povis esti submetitaj al praktika provo: Volapük kaj Esperanto.’

En tiuj teksteroj Moch klarigas la konceptojn *apriora* kaj *aposteriora planlingvo*. La kategorion *miksita* mi en lia raporto ne vidas. Ĝi ŝajnas al mi esti aldonita de Couturat kaj Leau. Tamen Kuznecov en ĉi tiu detalo aliopiniis:

[...] триада терминов (“априори – апостериори – микст”) введена Г. Моком в 1897 г. [Moch] и получает окончательное признание после опубликования “Истории всеобщего языка” Л. Кутюра и Л. Ло (1903). (Kuznecov 1991: 175)

‘[...] la triopon de la terminoj (“apriora – aposteriora – miksita”) enkondukas en 1897 G. Moch kaj ĝi ricevas definitivan rekonon per la publikigo de la “Historio de la universala lingvo” de L. Couturat kaj L. Leau (1903).’

En sia detaleme ellaborita studo pri la terminaro de la interlingvistiko Kuznecov ne donas bibliografiajn detalojn pri Moch. Same li faras en artikolo pri la tipologio de la planlingvoj (Kuznecov 1976: 61). Mi tial supozas, ke Kuznecov ne vidis la tekston de Moch sed premisas, ke tio, kion skribas Couturat kaj Leau, komplete originas de Moch.

Ni revenu al la raporto de Moch. En la citita loko de sia raporto li klarigas la konceptoparon. Tamen li parolas en preterpasa tono. Necesas kompreneble konsideri, ke temas pri raporto al packongreso kaj ke oni do ne rajtas atendi lingvistan precizemon pri fontoj. Kaj eble oni en la 19-a jarcento esprimas ideojn alie ol nun. Tamen restas la demando, ĉu fakte Moch ĉi tie enkondukas kaj difinas novajn konceptojn aŭ ĉu eble per siaj vortoj li nur intencas informi pri io, kio sensube por la kongresanoj estas novaĵo, sed kio en la lingvistiko de lia tempo jam estas konata. La packongresoj ĉiam denove prokrastas decidon pri la internacia lingvo. En sia raporto al la 14-a kongreso en Lucerno Moch denove klarigas la klasifikon de aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj (Moch 1905: 165), nun referencante al sia raporto al la 8-a kongreso en Hamburgo (Moch 1897a). Sed pri la kreinto(j) de la klasifiko li diras nenion.

Du indicoj kredebligas, ke la konceptoparo povus esti enkondukita jam antaŭ Moch: (1) la mencio de la Société de Linguistique en la piednoto de Couturat kaj Leau (1903: XXVIII n. 1), (2) publikaĵoj de Baron (1981, 1985), kiuj referencas al Kartezio. Mi analizos (1) en sekcio 2.3 kaj (2) en sekcio 2.4.

### 2.3 La Internacia Lingvistika Societo

Kiel ni vidis, Couturat kaj Leau referencas al la raporto de Moch por la hamburga packongreso kaj aldonas: “Cf. le rapport du Comité de la *Société de Linguistique* (Section I, ch. XI)” (Couturat/Leau 1903: XXVIII n. 1, kiun mi supre komplete citas) ‘Vidu la raporton de la Komitato de la *Société de Linguistique* ‘Lingvistika Societo’ (sekcio I, ĉ. XI).’ La detaloj en la parentezo koncernas sekcion en la sama libro (Couturat/Leau 1903: 71–76). Tie la aŭtoroj raportas pri *Société internationale de Linguistique* ‘Internacia Lingvistika Societo’. Mi nun transiras de la konciza priskribo ĉe Couturat kaj Leau al la originala fonto. Ĉar la interlingvistoj, laŭ mia scio, nur malofte mencias

tiun fonton kaj eĉ multe malpli ofte utiligas ĝian enhavon, mi jen enŝovas ekskurson pri la publikaĵo mem (sekcio 2.3.1) kaj post tio revenas al la demando, kio en ĝi troveblas pri la klasifiko de la planlingvoj (sekcio 2.3.2).

### 2.3.1 Ekskurso: La Tribuno de la Lingvistoj

La *Société internationale de Linguistique* ‘Internacia Lingvistika Societo’ aktivas meze de la 19-a jarcento en Parizo.<sup>13</sup> Pri la komenco de ĝia laboro la fontoj mencias diversajn datojn inter 1850 kaj 1856. Ŝajnas, ke en 1860 la agado finiĝas neplanite. En la jaroj 1858 ĝis 1860 la Societo eldonas la revuon *La Tribune des Linguistes* ‘Tribuno de la lingvistoj’.<sup>14</sup> Se priskribi ĝin per nuntempaj vortoj, la Societo difinas por si aplikajn celojn, inter kiuj la problemo de la internacia aŭ universala lingvo okupas gravan lokon. Nuntempe la Tribuno estas elŝutebla (Tribune 1858–1859, 1859–1860). Por jarkolekto 1 oni trovas faksimilon de bindita volumo kun 624 tutvolume numeritaj paĝoj kaj por jarkolekto 2 pliajn 144 paĝojn. Laŭ la enhavtabelo la kontribuaĵoj de jarkolekto 1 aperas inter oktobro 1858 kaj septembro 1859 en 12 monataj kajeroj. Jarkolekto 2 enhavas tri kajerojn de oktobro 1859 ĝis januaro 1860 (Bibliothèque 2018c).

La Societo fondas *Comité de la Langue universelle* ‘Komitato pri la universala lingvo’ (Henricy 1858a: 17) kun 23 membroj.<sup>15</sup> La plej grava aktivulo estas Casimir Henricy (1814–1901?).<sup>16</sup> En la Tribuno troviĝas la raporto de la Komitato kaj, se mi nenion pretervidis, pliaj 11 kontribuaĵoj kun rilato al la problemo de la internacia lingvo. Mi listigas ilin en laŭtema ordo (Manders 1947: 63 n. 1 donas similan liston):

- Unua raporto de la Komitato (Henricy 1858a)
- Dua raporto de la Komitato en du partoj (Henricy 1958b)
- Eltiraĵo el protokolo kiel suplemento de la raporto de la Komitato (Henricy 1859b)
- Unua letero pri la raporto de la Komitato (Letellier 1859a)
- Respondo al la unua letero de Letellier (Henricy 1859a)

<sup>13</sup> Internacia Lingvistika Societo: Couturat/Leau (1903: 71), Koerner (1976/1978: 129 n. 3), Auroux/Dougnac/Hordé (1982: 118, 131 n. 2), Noordegraaf (1988), Décimo (2012). La Societo komence ne uzas en sia nomo la vorton “internationale” ‘internacia’ kaj nur poste ĝin aldonas.

<sup>14</sup> Tribuno de la lingvistoj: En redakcia noto Henricy emfazas la sendependecon de la revuo de la Societo (Henricy 1858c). Aliflanke Henricy estas estrarano de la Societo kaj la estraro estas indikita kiel eldonanto de la revuo. La raportoj de la Komitato (Henricy 1858a,b) portas kiel supertitolan linion la nomon de la Societo kaj kiel subskribon tiun de Henricy. – Pri la Tribuno: Auroux/Dougnac/Hordé (1982: 118, 131 n. 2), Décimo (2012). La artikolo de Décimo estas aparte dediĉita al la Tribuno kaj prezentas tre multajn detalojn. Tamen, se temas pri la fidindeco de la informoj, mi legas ĝin kun iom da singardo. Tion kaŭzas kontraŭdiroj en la teksto (kiel komencan de la publikigo de la Tribuno la aŭtoro en la titolo mencias la jaron 1854 kaj en la teksto 1858), mankantaj fontindikoj pri tre multaj el la informoj, kaj la referenco al libro, kiu laŭ mia plej zorga scio ne ekzistas kaj kiu ankaŭ ne estas menciita en la katalogo de la Franca Nacia Biblioteko (Bibliothèque 2018b,c): “COUTURAT, Louis & LÉAU, Léopold (1904). *Histoire de l’alphabet universel*, Paris, Hachette.” (Décimo 2012: 8).

<sup>15</sup> Komitato: La membroj estas sinjoroj “Bertron, Bonnemère, Cazcaux, Charney, Chouet, Chouippe, Coulon-Pineau, Dechaux, Duvivier, Erdan, Gagne, Gitouville, Grosselin, Casimir Henricy, de Labarthe,” pastro “Latouche, Ch. Lemaire, Letellier, Mesnard, Morlon, Rodet, Silbermann” kaj la princo “de Sayn-Wittgenstein.” (Henricy 1858a: 20). Necesas distingi du sinjorojn Letellier. La aŭtoron de kelkaj kontribuaĵoj en la Tribuno oni tie nomas “C.-L.-A. Letellier” aŭ “Letellier (de Caen)”. Lia plena nomo estas Charles Louis Augustin Letellier. Li estas la aŭtoro de la planlingvo en la interlingvistiko kelkfoje nomata ‘lingvo de Letellier’. Alia persono estas la membro de la Komitato, kies nomo laŭ Décimo estas “L. N. H. Letellier” kaj por kies vivo Décimo donas la datojn “1801–1892”. Lin oni en la Tribuno nomas “Letellier (d’Amiens)”.

<sup>16</sup> Henricy: Liajn vivdatojn kun la necerteco rilate al la jaro de forpaso mi redonas laŭ Bibliothèque (2018c).

- Dua letero de Letellier (Letellier 1859b)
- Respondo al la dua letero de Letellier (Henricy 1860)
- Artikolo pri la universala lingvo en kvar partoj (Henricy 1859c)
- Artikolo pri la universala lingvo (Henricy 1859ĉ)
- Analizo de la lingvoprojekto de Sotos Ochando (Moigno 1859)
- Letero de Sotos Ochando (Sotos Ochando 1859a)
- Artikolo pri la kemia terminaro en la planlingvo en du partoj (Sotos Ochando 1859b)
- Rimarkoj pri la artikolo de Sotos Ochando (Henricy 1859d)
- Artikolo pri la botanika terminaro en la planlingvo (Sotos Ochando 1859c)

Kun la temo de la internacia lingvo interplektiĝas aro da kontribuajoj pri la problemoj de universala alfabeto. Ilin mi ĉi tie ne listigas.

La Komitato studas la problemon de la internacia lingvo, esploras la taŭgecon de klasikaj kaj samtempaj lingvoj por tiu funkcio, detale analizas filozofiajn universalajn lingvojn kaj pli suprajne diskutas la ideon de aposterioraj planlingvoj. Ĝi decidas akcepti la aprioran principon.<sup>17</sup>

### 2.3.2 La Komitato pri la universala lingvo

Por la hodiaŭa interlingvistiko la detala raporto pri la laboro de la Komitato kaj la unuopaj artikoloj kaj leteroj en la revuo estas interesaj kaj legindaj. Tamen nin ĉi tie interesu nur la klasifiko de la planlingvoj. Couturat kaj Leau (1903: 72) atentigas pri tio, ke jam la Komitato uzas la konceptaron. En la komitata raporto ni legas la jenon:

Il ne restait donc plus en présence que deux systèmes de langues: celui d'une langue *à posteriori*, c'est-à-dire, faite de pièces et de morceaux, avec des radicaux, des onomatopées, des mots pris dans toutes les langues mortes et vivantes, d'après les idées des étymologistes tels que Volney, Burnouf, Ampère, etc.; et celui d'une langue *à priori*, c'est-à-dire entièrement neuve. (Henricy 1858a: 29–30)

'Restas do nur du lingvosistemoj: tiu de la *aposterioraj* lingvoj, t. e. kreitaj de ĉio havebla, kun radikoj, onomatopeoj, kun vortoj prenitaj el ĉiuj mortintaj kaj vivantaj lingvoj laŭ la ideoj de etimologoj kiel Volney, Burnouf, Ampère ktp., kaj tiu de la *aprioraj*, t. e. komplete novaj lingvoj.'

Povus do esti, ke Moch, kiam li verkas sian raporton por la packongreso, scias pri ĉi tiuj rezonadoj. Ankaŭ Couturat kaj Leau (1903: 72) citas tiujn frazojn, sed, bedaŭrinde sen klarigo, ili unuavice referencas al Moch kiel fonto de la klasifiko kaj nur aldone atentigas pri sia propra ĉapitro pri la Komitato (Couturat/Leau 1903: XXVIII n. 1, kiun mi supre komplete citas). Ili ne klarigas, ĉu Moch estas informita pri la laboro de la Komitato, kiam li verkas la kongresraporton.

Samkiel la frazoj el la raporto de Moch ankaŭ la teksto de la Komitato ŝajnas al mi ne sen dubo esti legenda kiel enkonduko de nova termino. Denove la esprimmaniero estas sufiĉe preterpasa, kio laŭ mi nepre permesas interpreti la tekston tiel, ke la raporto de la Komitato

<sup>17</sup> Apriora principo: Couturat kaj Leau (1903: 75) konsideras la decidon de la Komitato eraro kaj starigas kontraŭ ĝi la vidpunkton de la filozofo Charles Renouvier, kiu en la samaj jaroj, kiam aktivis la Komitato, kritikis la aprioran principon kiel nerealegeblan kaj kontraste al ĝi forte subtenas la aposterioran principon (Renouvier 1855: 81–82). Indas memori, ke en la mezo de la 19-a jarcento ankoraŭ ne ekzistas praktike funkcia planlingvo kaj do mankas empiriaj faktoj. (La unua komunike realigita planlingvo estas, ekde 1879, Volapük, apartenanta al la miksitaj tipo.)

ripetas distingon de konceptoj jam konatan. La komitata raporto mem tamen ne mencias iujn ajn fontojn.<sup>18</sup>

Per mia serĉo mi trovis unusolan publikaĵon, kiu klare ligas la koncernan klasifikon nur al la pariza Komitato pri la universala lingvo kiel sola fonto:

[...]; the important distinction, coined in 1856 in a paper at the Société de Linguistique, is between *a priori* languages and *a posteriori* languages. (Gordin 2015: 112)

‘[...] la grava distingo, difinita en 1856 en artikolo ĉe la Lingvistika Societo, estas inter *aprioraj* lingvoj kaj *aposterioraj* lingvoj.’

Gordin ne donas referencon aŭ bibliografiajn detalojn, tiel ke povas esti, ke lia informo originas de Couturat kaj Leau, en kies piednoto ni legas, ke la unua parto de la komitata raporto estis prezentita al la Lingvistika Societo la 3-an de julio 1856 (Couturat/Leau 1903: XXVII n. 1). Tamen dubindas, ĉu Gordin konsultis unuavican fonton.<sup>19</sup> Iom malpli klara ol la teksto de Gordin estas tiu de Clark. Mi jam menciis, Clark klarigas la klasifikon per propraj vortoj kaj kelkajn liniojn pli poste nomas Couturat kaj Leau (1903) kiel fonton de la detala priskribo de unuopaj planlingvoj, kiun li ordigas laŭ la klasifiko (Clark 1907: 77–78). La sekcio tie komenciĝanta pri aprioraj lingvoj enhavas numeritajn alineojn kun bazaj informoj kaj parte kun pli detalaj klarigoj pri unuopaj lingvosistemoj. Sub n-ro 12 Clark mencias la Internacian Lingvistikan Societon kaj ties “First report dated 1856” “Unuan raporton de 1856” (tio estas Henricy 1858a). Clark tie tre koncize resumas la laboron de la Komitato. Li mencias la aprioran kaj la aposterioran principojn, sed ne diras ion ajn pri tio, kiu kreis la terminojn (Clark 1907: 80). Clark ne donas bibliografiajn detalojn.

Krom Gordin (2015) mi ne konas lastatempajn publikaĵojn, kiuj nomus kiel fonton de la klasifiko nur la Societon aŭ ĝian Komitaton. La aŭtoroj, kiuj ĉi-rilate mencias la parizan Komitaton pri la universala lingvo, mencias ĝin aldone al Couturat kaj Leau aŭ aldone al Moch. Inter tiuj estas Couturat kaj Leau (1903: 71–76) mem kaj sekvante ilin Szilágyi (1931/1976: 172), Manders (1947: 62–64), Kuznecov (1987: 78–79, 1991: 175) kaj Sakaguchi (1998: 97 kaj n. 426). Iliaj mencioj ne nepre signifas, ke la aŭtoroj vidis la publikaĵojn de la Komitato, ĉar ili ne donas pli da informo, ol kion eblas ĉerpi el la noto kaj la ĉapitro de Couturat kaj Leau. Kelkaj sciencistoj ja mencias la rezonadojn de la Komitato pri universalaj lingvoj kaj ja uzas la klasifikon de aprioraj kaj aposterioraj lingvoj, kaj tamen ne nomas la Komitaton kiel fonton de la koncepta distingo, sed por tio referencas al Moch aŭ al Couturat kaj Leau (ekz. Jacob 1947: 90; Schmidt-Radefeldt 1998: 681). Drezen referas la laboron de la Komitato kaj uzas la klasifikon, sed li ne nomas la Komitaton nek iun alian kreinto de la klasifiko (Drezen 1931: 84–85).

<sup>18</sup> Komitato: Décimo (2012: 2) riproĉas al la Komitato neprofesiecon; tamen li ja mem ne estas libera de ĉia kritikindeco (vidu supre noton 14). Kuznecov (1987: 78–79) juĝas pli zorge. Couturat kaj Leau (1903: 72) emfazas la signifon de la studoj de la Komitato, simile Schmidt-Radefeldt (1998: 681).

<sup>19</sup> Societo: Gordin nomas la Societon “Société de Linguistique”. Tiel legeblas ĉe Couturat kaj Leau. En la originala fonto tamen ĝia nomo aperas kiel “Société internationale de Linguistique” (Henricy 1858a,b). Tial povas esti, ke la informoj de Gordin originas de Couturat kaj Leau.

## 2.4 Kartezio kaj Wilkins

Kiel mi jam menciis, ekzistas informoj pri ebla eĉ pli frua kreinto de la klasifiko de planlingvoj – René Descartes (Kartezio) (1596–1650):

*A priori and a posteriori languages.* There are, in principle, two distinct types of universal languages, so distinguished by René Descartes in 1629. The first, *a priori* (or later called ‘philosophical’) languages and the second, *a posteriori* languages. (Baron 1985: 17)

‘*Aprioraj kaj aposterioraj lingvoj.* Ekzistas principe du malsamaj tipoj de universalaj lingvoj, distingitaj de René Descartes en 1629. La unua, la *aprioraj* (aŭ poste nomitaj ‘filozofiaj’) lingvoj kaj la dua, la *aposterioraj* lingvoj.’

En ĉi tiu artikolo Baron ne donas ekzaktajn bibliografiajn detalojn, tiel ke malfacilas spuri la originon de ŝia informo. Ankaŭ tiun mencion mi transprenas en pli frua publikaĵo, bedaŭrinde ne mem ĝin esplorinte (Schubert 1993: 318, 359 n. 5). En alia publikaĵo Baron tamen ja mencias sian fonton:

In a letter to Mersenne in 1629, René Descartes distinguished between two types of universal languages: *a priori* languages (later referred to as “philosophical languages”) and *a posteriori* languages. *A priori* languages, which were particularly popular in the seventeenth and eighteenth centuries, were composed of “arbitrarily selected letters, syllables or words indicating an idea, or a group of ideas in accordance with a determined classification and based in no way upon natural languages” (Beaufront, 1919: vii). (Baron 1981: 50)<sup>20</sup>

‘En letero de 1629 al Mersenne René Descartes distingas du tipojn de universalaj lingvoj: apriorajn lingvojn (poste nomitajn “filozofiaj lingvoj”) kaj aposteriorajn lingvojn. Aprioraj lingvoj, kiuj estis aparte ŝatataj en la 17-a kaj la 18-a jarcentoj, estis kompilitaj el “arbitre elektitaj literoj, silaboj aŭ vortoj signifantaj ideon aŭ grupon de ideoj laŭ difinita klasifiko kaj neniel ajn bazitaj sur naturaj lingvoj” (Beaufront, 1919: vii).’

La bibliografiaj detaloj, kiujn Baron donas ĉi-rilate, tekstas:

Beaufront, Louis de (1919). *Complete Manual of the Auxiliary Language Ido*. London: Sir I. Pitman and Sons. (Baron 1981: 267)

Rigardo al ĉi tiu publikaĵo montras, se mi ne eraras, ke Beaufront ne estas la aŭtoro aŭ almenaŭ ne la sola aŭtoro de la libro konsultita de Baron. En la titola paĝo oni legas “Revised by L. de Beaufront” ‘Reviziita de L. de Beaufront’ (Complete Manual 1919: titolpaĝo) kaj en la antaŭparolo oni mencias diversajn personojn kiel aŭtorojn de unuopaj sekcioj, kiuj tamen supozeble estis tradukitaj kaj eble reviziitaj por ĉi tiu anglalingva publikaĵo. La sekcio “Introduction” ‘Enkonduko’, en kiu troveblas la peco citita de Baron, portas la subskribon “F. H. B.”, tiel ke Beaufront ŝajnas ne esti ĝia aŭtoro. La *Complete Manual* ne estas scienca publikaĵo kaj ni do ne povas atendi tiel ekzaktajn indikojn, kiel ni hodiaŭ emus tie trovi. Mi traktas la libron kiel anoniman publikaĵon.

---

<sup>20</sup> Baron: Naomi Baron en 2018 bonvolis respondi al mi pri sia rezonado de antaŭ tri jardekoj, pro kio mi kore dankas.

La loko citita de Baron troviĝas sur paĝoj vii kaj viii kaj nur malgrave diferencas de la redono ĉe Baron. En la *Complete Manual* ankaŭ aperas la informo pri Kartezio:

Already in 1629 Descartes had defined the two principal systems of international language.

(Complete Manual 1919: vii)

‘Jam en 1629 Descartes difinis la du ĉefajn sistemojn de internaciaj lingvoj.’

Per tio, ke Baron en sia artikolo (Baron 1985: 17) nur nomas la aŭtoron kaj la jaron, ŝi transprenas la informon el la *Complete Manual*. En sia libro (Baron 1981: 50) ŝi tamen havas pli da informoj ol la aŭtoroj de la *Complete Manual*. Ĉi tie ŝi mencias leteron de Kartezio, en kiu laŭ ŝia informo troviĝas la konceptoparo. Fakte Kartezio en 1629 skribas al Marin Mersenne (1588–1648) plurajn leterojn, hodiaŭ publikigitajn, sed estas permeseble konjekti, ke Baron celas la faman leteron de la 20-a de novembro 1629, en kiu Kartezio detaligas siajn pensojn pri la problemo de universala lingvo.

Trarigardo de la letero, se mi ĝin bone komprenas, montras neniun eksplacitan konceptoparon de aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj nek teksteron kiu per aliaj vortoj formulus similan distingon (Descartes 1629). Tiun diagnozon laŭ mia kompreno subtenas Neis. Ŝi detale parolas pri la rezonado kaj la korespondadoj de Kartezio pri la problemo de universala lingvo. En tio ŝi uzas la terminon “a-priori-Sprachen” ‘aprioraj lingvoj’ (Neis 2009: 809). Se la konceptoparo *apriora*–*aposteriora* kun rilato al konscie kreitaj lingvoj devenus de Kartezio, jen estus la loko tion mencii. Tamen tion Neis ne faras. Kontraŭe, ŝi nomas kiel kreintojn de la klasifiko Couturat kaj Leau (1903) kaj aldone referencas al Large (1985) (Neis 2009: 807). Simile agas la membroj de la pariza Komitato pri la universala lingvo (Henricy 1858a,b, 1859b), kiuj unuflanke uzas la konceptoparon kaj aliflanke detale diskutas Kartezion, sed dum tio nenie nomas Kartezion kreinto de la klasifiko.

Tamen Kartezio ja diskutas la problemojn de sistema klasifiko de konceptoj, tipajn por la lingvoj kiujn ni hodiaŭ nomas aprioraj, kaj la problemojn de lernebleco kaj belsono, kiuj gravas por la aposterioraj lingvoj uzataj por komunikado. Tiusence Couturat kaj Leau interpretas la leteron de Kartezio kiel anticipon de la klasifiko (vidu Blanke 1985: 126):

Toutes ces idées se trouveront développées et appliquées chez les successeurs de Descartes. Mais, à côté de ces idées qui constituent le principe d’un *vocabulaire* philosophique tout différent de celui de nos langues, et qui caractérisent les langues *a priori*, il ne faut pas oublier que Descartes a émis des vues d’une justesse et d’une précision admirables sur la constitution d’une *grammaire* régulière et logique, applicable aux radicaux des langues *a posteriori*. On peut donc dire que, dans cette seule lettre, le père de la philosophie moderne a conçu et prévu les deux principaux systèmes de langue universelle que nous allons étudier tour à tour. (Couturat/Leau 1903: 14)

‘Ĉi ĉiujn ideojn evoluigas kaj aplikas la posteuloj de Descartes. Sed, apud ĉi tiuj ideoj, kiuj formas la principon de filozofia *vortprovizo* fundamente malsama de niaj lingvoj kaj kiuj karakterizas la *apriorajn* lingvojn, oni ne forgesu ke Descartes eldiris vidpunktojn de admirinda ĝusteco kaj precizeco pri la konsisto de regula kaj logika *grammatiko*, aplikebla al la radikoj de *aposterioraj* lingvoj. Oni do povas diri, ke, en tiu nura letero, la patro de nia moderna filozofio konceptigis kaj antaŭvidis la du ĉefajn principojn de universalaj lingvoj, kiujn ni ĉi tie analizos unu post la alia.’

Simile Maat kaj Cram trovas ĉe John Wilkins (1614–1672) ideojn, kiujn ili konsideras anticipo de la distingo de aprioraj kaj aposterioraj lingvoj:

Couturat and Leau (1903) proposed a distinction between a priori vs. a posteriori schemes: a posteriori schemes are based on existing languages, a priori ones on a language-independent model either of reality or of knowledge. The same distinction was made by 17th-century writers: thus Wilkins indicated that his early scheme propounded in his *Mercury* (1641) differed from his philosophical language published in 1668 in that the former proposed to take the vocabulary of Hebrew as a basis, whereas the latter was founded on ‘a regular enumeration of things and notions’.

(Maat/Cram 2000: 1033–1034)

‘Couturat kaj Leau (1903) proponis distingon de aprioraj kaj aposterioraj sistemoj: aposterioraj sistemoj baziĝas sur ekzistantaj lingvoj, aprioraj sur nelingvodependa modelo de la realeco aŭ de la scio. La saman distingon faris deksepjarcentaj aŭtoroj: Tiel Wilkins rimarkis, ke lia frua sistemo prezentita en lia *Mercury* (1641) diferencas de lia filozofia lingvo publikigita en 1668 per tio, ke la pli frua devis preni sian vortprovizon el la hebrea lingvo, dum la pli posta estis bazita sur ‘regula listigo de aĵoj kaj nocioj’.

Pri la skizoj de lingvosistemoj menciitaj en la citaĵo (*Mercury*: Wilkins 1641/1694, filozofia lingvo: Wilkins 1668) vidu ankaŭ Maat (2004: 155) kaj Neis (2009: 818–822). Kuznecov tute ĝenerale rigardas la rezonadon de Kartezio kaj la kleruloj de la 17-a ĝis 19-a jarcentoj pri lingvokonstruado kiel originon de intelekta evoluo, kiu kondukas al Couturat kaj Leau kaj plu al la hodiaŭa interlingvistiko (Kuznecov 1982: 32). Mi revenos en sekcio 4 al Kartezio, Wilkins kaj la interlingvistika konceptigo aludita de Kuznecov.

### 3 Pri la problemo de la klasifikaj trajtoj

La terminojn formulitajn de la pariza Komitato pri la universala lingvo (Henricy 1858a: 29–30) kaj de Moch (1897a: 6) oni hodiaŭ, ĉefe dank’ al Couturat kaj Leau (1903), en la interlingvistiko kaj en la pli vasta lingvistika tereno volonte akceptas. Kiel mi montris supre, multaj aŭtoroj esprimas la distingon de la du aŭ tri klasoj de konscie kreitaj lingvoj per sufiĉe malprecizaj vortoj. En la kazo de la publikaĵoj antaŭ Couturat kaj Leau la priskribo de la klasifiko subtenas la dubojn pri tio, ĉu iliaj vortoj vere estas la unuaj enkonduko de novaj terminoj. Krome en tiuj publikaĵoj samkiel en multaj publikaĵoj, kiuj referencas al Couturat kaj Leau, estas malklare, kio fakte estas la trajto de klasifiko. Al tio kontribuas nelaste Couturat kaj Leau mem per siaj tre ĝeneralaj priskriboj “ne tiennent aucun compte des langues naturelles” ‘tute ne konsideras naturajn lingvojn’ (= aprioraj) kaj “prenant pour modèle les langues naturelles” ‘prenas kiel modelojn naturajn lingvojn’ (= aposterioraj) (Couturat/Leau 1903: XXVII–XXVIII).

La kriterio de la klasifiko estas klara: la distingo inter aĵoj inventitaj kaj aĵoj pruntitaj. Sed kiujn trajtojn de la lingvosistemoj oni do taksu rilate al tiu kriterio?<sup>21</sup> La sciencistoj ne traktas tiun demandon same, des pli kiam la preciza difino de la klasifiko en ilia propra argumentado nur ludas flankan rolon. Oni povas sistemigi la starpunktojn de la diversaj sciencistoj laŭ la nivelo de la lingvo, sur kiu ili lokigas la trajtojn de klasifiko.

<sup>21</sup> Trajto kaj kriterio: Mi diferencigas *trajtojn*, kiuj estas ecoj de la analizataj objektoj, de *kriterioj*, kiuj estas konceptodistingoj difinitaj de la observanto por grupigi la objektojn.



La unuan grupon formas la studoj, kiuj konsideras nur la devenon de la leksiko, do, depende de la konstruo de la lingvo, la devenon de la morfemoj, la radikoj aŭ la vortoj. Al tiu grupo apartenas, kiom tio estas diagnozebla, la pariza Komitato pri la universala lingvo (Henricy 1858a: 29–30) kaj krome Szilágyi (1931/1976: 172), Monnerot-Dumaine (1960: 29–30) kaj Kuznecov (1976: 61, 1991: 175).

Al la dua grupo laŭ mi apartenas studoj, kiuj krom la leksiko konsideras ankaŭ la morfologion inkluzive de la vortfarado, la sintakson kaj eble pliajn gramatikajn trajtojn. En tiu grupo membras Noordegraaf (1988: 137), Duličenko (1990b: 20), Jeandillou (1997), Calero Vaquera (1999: 11, 27), Gardt (1999: 136, 324) kaj Neis (2009: 807). Ŝajnas al mi, ke ankaŭ Back apartenas al ĉi tiu grupo. Koncerne la klasifikon en apriorajn, aposteriorajn kaj miksitajn planlingvojn li tre ĝenerale parolas pri “Sprachelemente” ‘elementoj de la lingvo’, sed li metas ĉi tiun klasifikon en grupon de klasifikoj “nach der Struktur” ‘laŭ la strukturo’, kio laŭ mia kompreno inkluzivas la gramatikon (ambaŭ lokoj Back 1996: 883). La starpunkto de Sakaguchi situas inter la unua kaj la dua grupoj. Ŝi uzas la trajton “Wortstämme und Wortbildungselemente” (Sakaguchi 1997: 296–297 n. 5, 9) ‘radikoj kaj vortfaraj elementoj’. Se per ĉi-lastata ŝi celas nur la morfemojn de vortfarado, ŝia starpunkto apartenas al la unua grupo. Se tamen ŝi klasas ankaŭ laŭ la morfologiaj reguloj de la vortfarado, do jen estas ankaŭ iomete de la dua grupo.

Iom aliajn starpunktojn formulas tiuj aŭtoroj, kiuj aldone al la leksiko kaj la gramatiko inkluzivigas pliajn lingvonivelojn kiel ekzemple la sonsistemon aŭ la alfabeton (ekz. Calero Vaquera 1999: 27). Se tiuj studoj, malkiel la tria grupo, ne konsideras la kompletan lingvonkonstruon, do ili membras en la dua grupo.

En la tria grupo troviĝas studoj, kies aŭtoroj konsideras la principojn de la lingvokonstruo kiel tuton kaj kiuj do taksas la trajtojn de ĉiuj lingvoniveloj. Kiel unua ĉi tie menciindas Couturat, kiu tion esprimas sufiĉe klare (Couturat 1901: 63–64, 72), sed kiu ne ripetas ĝin samklare en sia komuna libro kun Leau. Ankaŭ Blanke membras en ĉi tiu grupo. Li parolas pri “Bauprinzipien” ‘konstruoprincipoj’ de la lingvosistemoj (Blanke 1985: 100–101) kaj por la klasifiko eksplicite ankaŭ uzas gramatikajn trajtojn (Blanke 1996a: 31). Li tamen ankaŭ konstatas, ke en la interlingvistiko por la klasifiko oni kutimas konsideri la leksikajn trajtojn pli ol la gramatikajn (Blanke 1985: 100–101; vidu ankaŭ Suchowolec 2018: 85). Fiedler (2006: 68) juĝas simile.

Fine ekzistas kvara grupo de studoj, kiuj rilate al la koncerna klasifiko neprecize parolas pri ‘elementoj’ aŭ ‘materialo’ de la lingvosistemo aŭ kiuj elektas kiel klastrajton la ĝenerale formulitan demandon, ĉu konscie kreita lingvosistemo baziĝas sur ekzistantaj lingvoj aŭ similas al ili. Mi krome metas en ĉi tiun grupon sciencistojn, kiuj uzas la klasifikon tute ne klarigante ĝin. Membroj de la kvara grupo estas Schuchardt (1904/1976: 54), Jespersen (1928), Kamman (1942: 180), Jacob (1947: 90), Manders (1947: 65–66), Strasser (1989: 207), Eco (1993/1994: 15), Maat kaj Cram (2000: 1033–1034), Ley (2005: 28), Klare (2010: 10) kaj Meyer (2014: 29, 2016: 92).

Kompreneble multaj aliaj aŭtoroj, ĉi tie ne menciitaj, uzas la klasifikon.

#### 4 Konkludo

Kio estas la rezulto de ĉi tiu esploro? Antaŭ ol mi klopodas konkludi, indas enordigi la klasifikon en pli vastan kadron. La koncepta distingo inter aprioraj, miksitaj kaj aposterioraj planlingvoj

metas ĉiun konscie kreitan lingvon en unu el tri grupoj. Tiu grupigo ne estas tre fajna. Se oni distingas pli detale, oni, ne surprize, konstatas, ke fakte ne ekzistas tripartigo, sed senŝtupa skalo inter la polusoj *inventita* kaj *pruntita*, kaj tio validas kaj se oni konsideras nur la leksikajn trajtojn, kaj se oni difinas tiel vaste kiel Couturat en sia libro pri Leibniz kaj do konsideras kiel klasilon la kompletan konstruprincipon de la koncerna lingvosistemo (Couturat 1901: 63–64, 72).

Ĉar el la planlingvosistemoj proponitaj ĝis hodiaŭ la plej multaj troviĝas en la aposteriora parto de la skalo, en la interlingvistiko oni kutimas ne simple meti ĉiujn sistemojn kun kaj aprioraj kaj aposterioraj trajtoj en la miksitan grupon. Kontraŭe, oni starigas grandan aposterioran grupon kaj subdividas ĝin laŭ la sama kriterio *inventita–pruntita*. La planlingvoj kun pli granda inventita trajtaro nomiĝas *skemaj* (aŭ *aŭtonomaj*) kaj tiuj kun pli granda pruntita trajtaro *naturalismaj* lingvoj (Blanke 1985: 102–103). Samkiel Blanke kaj malkiel Back (1996: 883) mi do ne konsideras la distingon de skemaj kaj naturalismaj planlingvoj kiel alian, sendependan klasifikon, sed kiel parton de la klasifiko *apriora–aposteriora*, kiu pli precize subdividas la aposterioran grupon (same inter aliaj Meyer 2016: 92).

Dum per tio la klasifiko *apriora–aposteriora* ricevas subdividon, ĝi siaflanke estas parto de pli vastaj tipologiaj klasifikoj, kiuj same aplikas la kriteriojn *inventita–pruntita*. Konscia stirado kaj per tio do inventitaj elementoj kompreneble ekzistas ankaŭ en lingvoj ekster la planlingvoj kaj same en nelingvaj komunikiloj. Tial la kriterioj *inventita–pruntita* taŭgas ankaŭ por klasi tiujn sistemojn. En prelego eldirita en 1956 Bokarev konstatas:

Различие между так называемыми естественными и искусственными языками состоит лишь в том, что степень сознательного воздействия на развитие языка не одинакова.

(Bokarev 1976: 18–19)

‘La diferenco inter la tiel nomataj naturaj kaj la artefaritaj lingvoj konsistas nur en tio, ke la grado de konscia influo al la evoluo de la lingvo ne estas la sama.’

Konformas do al la empiriaj faktoj, se oni konsideras la konstruadon de planlingvoj kiel grade, sed ne kiel absolute alispecan ol aliajn manierojn de konscia stirado de lingvaj kaj nelingvaj komunikiloj. Tia stirado ekzemple estas kutima en lingvoplanado (ekz. Tauli 1968: 167; Asbach-Schnitker 1984: ix; Blanke 1985: 22–35). Sekve la klasifiko de la planlingvoj estas pligrandigita eltondaĵo el klasifikoj kun la kriterioj *inventita–pruntita* aŭ *artefarita–natura*, kiuj traktas ĉiujn lingvojn (Schubert 1989: 22–23, 2011b: 370) aŭ eĉ trans la lingvoj ĉiujn semiotikajn sistemojn (Eco 1968/1972/1985: 20–27) kaj per tio transmetas la klasikan konceptoparon *kulturo–naturo* en la sferon de la komunikado.

Laŭ mia juĝo la esploro raportita ĉi tie havas du rezultojn. Se temas pri la demando pri la kreinto de la klasifiko, evidentiĝas denove tio, kion Couturat kaj Leau (1903: XXVIII n. 1) jam mem klare diras, ke la klasifiko ne estas ilia inventaĵo, sed ke ili ĝin prenas de Moch (1897a). Laŭ mia diagnozo la kategorion *miksita* tamen aldonis Couturat kaj Leau. Mi ne estas la unua, kiu trovis la jenon, sed eble mi povas kontribui pli vaste sciigi la ĉi-sekvan informon: Multe malpli konate estas, ke la distingon inter aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj jam en la 1850-aj jaroj uzis la pariza Komitato pri la universala lingvo (Henricy 1858a,b, 1859b). Ĉar la vortoj de la Komitato ne estas esprimitaj kiel enkonduko aŭ difino de termino, mi opinias, ke estas verŝajne, ke la origino troviĝas eĉ pli frue en la pasinto.

La teksteroj de Kartezio kaj Wilkins, cititaj de la sciencistoj, ne pravas, ke tiuj du kleruloj estas la kreintoj de la klasifiko. Laŭ mi tiuj citaĵoj tamen montras alian fenomenon, kiu en la historio de la scienco ne estas malofta. Scienca koncepto aŭ koncepta distingo ofte ne estiĝas en klare identigebla momento ĉe klare identigebla kreanto, sed ĝi evoluas en la scienca debato kaj de unu mencio al la sekva fariĝas ĉiam iomete pli preciza, ĝis fine ĝi ricevas taŭgan terminon kaj komencas disvastiĝi.<sup>22</sup> Ŝajnas al mi, ke ankaŭ en la kazo analizata ĉi tie ni observas tian iompostioman konceptiĝon: Kartezio, Wilkins kaj sendube ankaŭ aliaj kleruloj aludas al ideoj, kiuj en la daŭro de la jardekoj kaj jarcentoj fariĝas pli kaj pli konkretaj, ĝis fine iu formulas precizan terminon. Eble la konceptiĝo okazas en tiel malgrandaj paŝoj, ke ne ekzistas klare identigebla komenco kaj per tio ne ekzistas unusola kreinto. La esprimoj diskutitaj supre laŭ mia juĝo subtenas tiun supozon. Se oni konsideras la cititajn tekstojn, al kiuj sendube eblus aldoni pliajn, kiel tuton, do oni tie observas procezon de malrapida *terminiĝo* en la senco, kiun priskribas Roelcke (2012: 5). Se oni ordigas la tekstojn ne laŭ la dato de publikigo, sed laŭ la grado de terminiĝo, do oni ricevas proksimume la jenan sinsekvon: Maistre (1821/1854: 109), Slaughter (1982: 143), Couturat (1901: 63–64), Henricy (1858a: 29–30), Moch (1897a: 6), Couturat kaj Leau (1903: XXVII–XXVIII).

La interlingvistiko estas la “Wissenschaft von der Optimierung der internationalen sprachlichen Kommunikation” (Blanke 1985: 17) ‘scienco pri la optimumigo de la internacia lingva komunikado’.<sup>23</sup> Se oni plivastigas la objektaron aldonante lingvojn kaj semiotikajn sistemojn, kiuj ne aŭ ne nur funkcias en la internacia komunikado, do oni ricevas la *sintezajn lingvojn*,<sup>24</sup> t. e. la tuton de la konscie kreitaj kaj la konscie modifitaj lingvoj. La interlingvistiko transportas la rezultojn de la esplorado de sintezaj lingvoj kiel la *ĉefideon optimumigo*<sup>25</sup> en la ĝeneralan esploron en lingvistiko kaj komunikologio pri manieroj de komunikado optimumigitaj por pli bona kompreno. Tiaj komprenoptimumigitaj lingvoj kaj komunikiloj estas difinaj iloj de la faka komunikado (Schubert 2007: 144) kaj nuntempe ankaŭ estas pli kaj pli vaste uzataj en la senbariera komunikado. La tipologia skalo de variaj gradoj de konscia stirado, esprimiĝanta en la apriora kaj la aposteriora konstruprincipoj, estas teoria modelo de centra graveco, kiu el la interlingvistiko radias en la pli vastan lingvistikon kaj komunikologion.

<sup>22</sup> Evoluo de koncepto: Similan iompostioman konkretiĝon mi montras en la kazo de la konceptiĝo kaj estiĝo de la disciplino tradukologio en la 19-a jarcento (Schubert 2015: 602–604).

<sup>23</sup> Interlingvistiko: Tio estas konciza priskribo el enkonduka ĉapitro. Aliloke Blanke difinas pli detale (Blanke 1998/2006). Aliajn difinojn donas Duliĉenko (1982), Kuznecov (1987: 5–7), Sakaguchi (1998: 309–322) kaj Fiedler (1999: 18–22). Komparo de pli kaj malpli vastaj difinoj: Schubert (1989: 8–17).

<sup>24</sup> Sintezaj lingvoj: Tiun terminon mi kreis komence kiel hiperonimon por signifi la planlingvojn kaj la reguligitajn lingvojn de la teknika dokumentado. En pli novaj studoj mi uzas ĝin en iom pli vasta senco por ĉiuj konscie kreitaj aŭ konscie modifitaj lingvoj. La termino havas germanan-esperantan devenon. Mi unue uzas ĝin en la germana lingvo (*gestaltete Sprache*, Schubert 2001), sed prenas ĝin el esperantlingva artikolo de Wüster, kiu parolas pri lingvistiko de la aktiva, konscia stirado kaj kreado de lingvoj, kiun li nomas “sinteza lingvistiko” (Wüster 1955: 209). Lia artikolo havas germanan resumon, en kiu la sinteza lingvistiko aperas kiel “gestaltende Sprachwissenschaft” (Wüster 1955: 213). El tio mi derivas la germanan terminon *gestaltete Sprache* kaj do ĉi tie rekomendas ĝin al Esperanto en la formo de *sintezaj lingvoj*.

<sup>25</sup> Ĉefideo: La koncepton *ĉefideo* mi unue uzas en la germana kiel *Leitidee*. Ĝi signifas koncepton aŭ klarigon enkondukitan en la scienca debato kaj uzatan de pluraj sciencistoj de malsamaj skoloj sendepende unuj de la aliaj (Schubert 2007: 140). Chesterman uzas la anglalingvan terminon *supermeme* por pli-malpli la sama enhavo (Chesterman 1997: 5–14).

## Literaturo

Ĉe presitaj publikaĵoj, kiuj ankaŭ troveblas en la Interreto, mi nur tiam aldonas retadreson, se de tiu retejo la publikaĵo povas esti elŝutita komplete (do ne nur elтираĵo). Ĉe retaj publikaĵoj sen konstanta retadreso mi indikas la adreson de supera retejo, de kie oni povas serĉi la koncernan publikaĵon.

- Asbach-Schnitker, Brigitte (1984): "Introduction." John Wilkins: *Mercury: or the secret and swift messenger. [...] Together with an abstract of Dr. Wilkins's Essay towards a real character and a philosophical language*. Brigitte Asbach-Schnitker (red.). (Foundations of semiotics 6.) Amsterdam/Philadelphia: Benjamins, ix–cix
- Auroux, Sylvain; Françoise Dognac, Tristan Hordé (1982): "Les premiers périodiques linguistiques français (1784–1840)." *Histoire Épistémologie Langage* 4 [1]: 117–132 – [https://www.persee.fr/doc/AsPDF/hel\\_0750-8069\\_1982\\_num\\_4\\_1\\_1094.pdf](https://www.persee.fr/doc/AsPDF/hel_0750-8069_1982_num_4_1_1094.pdf) (17.09.2018)
- Back, Otto (1996): "Plansprachen." Hans Goebel, Peter H. Nelde, Zdeněk Starý, Wolfgang Wölck (red.): *Kontaktlinguistik*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 12.1.) Berlin/New York: de Gruyter, 881–887
- Baron, Naomi S. (1981): *Speech, writing, and sign*. Bloomington: Indiana University Press
- Baron, Naomi S. (1985): "From universal language to language origin: The problem of shared referents." *Semiotica* 57 [1–2]: 13–32
- Bibliothèque nationale de France (2018a): Congrès universel de la paix (08; 1897; Hambourg, Allemagne) – Éditeur scientifique. [Katalogero.] – <http://data.bnf.fr/documents-by-rdt/12386160/360/page1> (17.09.2018)
- Bibliothèque nationale de France (2018b): Louis Couturat. [Katalogero.] – [http://data.bnf.fr/12278947/louis\\_couturat/](http://data.bnf.fr/12278947/louis_couturat/) (17.09.2018)
- Bibliothèque nationale de France (2018c): Casimir Henrycy. [Katalogero.] – [http://data.bnf.fr/14558241/casimir\\_henricy/](http://data.bnf.fr/14558241/casimir_henricy/) (17.09.2018)
- Bibliothèque nationale de France (2018ĉ): Léopold Leau. [Katalogero.] – [http://data.bnf.fr/fr/12351928/leopold\\_leau/](http://data.bnf.fr/fr/12351928/leopold_leau/) (17.09.2018)
- Bibliothèque nationale de France (2018d): La Tribune des linguistes. [Katalogero.] – [http://data.bnf.fr/32881171/la\\_tribune\\_des\\_linguistes/](http://data.bnf.fr/32881171/la_tribune_des_linguistes/) (17.09.2018)
- Blanke, Detlev (1985): *Internationale Plansprachen*. (Sammlung Akademie-Verlag 34 Sprache.) Berlin: Akademie-Verlag
- Blanke, Detlev (1996a): "Leibniz und die Lingua Universalis." *Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät* 13 [5]: 27–35 – [http://leibnizsozietat.de/wp-content/uploads/2012/10/02\\_blanke.pdf](http://leibnizsozietat.de/wp-content/uploads/2012/10/02_blanke.pdf) (17.09.2018)
- Blanke, Detlev (1996b): "Zur Plansprache Esperanto und zur Esperantologie im Werk von Eugen Wüster." Heiner Eichner, Peter Ernst, Sergios Katsikas (red.): *Sprachnormung und Sprachplanung*. Wien: Praesens, 311–329 – reviziita versio: Detlev Blanke (2006): "Zur Plansprache Esperanto und zur Esperantologie im Werk von Eugen Wüster." Detlev Blanke: *Interlinguistische Beiträge*. Sabine Fiedler (red.). Frankfurt/M.: Lang, 163–176 + bibl. 339–390
- Blanke, Detlev (1998): "Was ist Interlinguistik?" *Sitzungsberichte der Leibniz-Sozietät* 21 [2]: 45–76 – pliampleksigita versio: Detlev Blanke (2006): "Zum Gegenstand der Interlinguistik." Detlev Blanke: *Interlinguistische Beiträge*. Sabine Fiedler (red.). Frankfurt am Main u.a.: Lang, 19–47 + bibl. 339–390
- Blanke, Detlev (2001): "Vom Entwurf zur Sprache." Klaus Schubert (red.): *Planned languages: From concept to reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 37–89 – reviziita versio: Detlev Blanke (2006): "Vom Entwurf zur Sprache." Detlev Blanke: *Interlinguistische Beiträge*. Sabine Fiedler (red.). Frankfurt am Main u. a.: Lang, 49–98 + bibl. 339–390
- Blanke, Detlev (2004): "Plansprachen." Geert Booij, Christian Lehmann, Joachim Mugdan, Stavros Skopeteas kun Wolfgang Kesselheim (red.): *Morphologie / Morphology*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 17.2.) Berlin/New York: de Gruyter, 1563–1573

- Blanke, Detlev (2015): “How not to reinvent the wheel... the essential scholarly literature in interlinguistics and esperantology.” *Indecs: Interdisciplinary Description of Complex Systems* 13 [2]: 200–215 – <http://doi.org/10.7906/indecs.13.2.2> (17.09.2018)
- Böhmer, Heiner (2001): “Künstliche Sprachen und Universalsprachen.” Martin Haspelmath, Ekkehard König, Wulf Oesterreicher, Wolfgang Raible (red.): *Sprachtypologie und sprachliche Universalien*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 20.1.) Berlin/New York: Walter de Gruyter, 85–94
- Бокарев, Евгений Алексеевич (1976): “Современное состояние вопроса о международном вспомогательном языке (факты об эсперанто).” М. И. Исаев (red.): *Проблемы международного вспомогательного языка*. Москва: Наука, 12–20 – <https://www.booksite.ru/fulltext/interling/text.pdf> (17.09.2018)
- Bulletin officiel du VIII<sup>e</sup> Congrès universel de la Paix tenu à Hambourg du 12 au 16 août 1897*. (1897). Berne: Bureau International de la Paix – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Calero Vaquera, María Luisa (1999): *Proyectos de lengua universal. La contribución española*. Córdoba: Universidad de Córdoba – <https://www.raco.cat/index.php/Elies/article/download/271560/359188> (17.09.2018)
- Chesterman, Andrew (1997): *Memes of translation*. (Benjamins Translation Library 22.) Amsterdam/Philadelphia: Benjamins
- Clark, Walter John (1907): *International language*. London: Dent – [https://archive.org](https://archive.org/) (17.09.2018)
- Complete manual of the auxiliary language Ido*. (1919). London: Pitman – <http://en.ido.li/wp-content/uploads/2015/10/Complete-Manual.pdf> (17.09.2018)
- Couturat, Louis (1901): *La logique de Leibniz d'après des documents inédits*. Paris: Alcan – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Couturat, Louis; Léopold Leau (1903): *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette
- Couturat, Louis; Léopold Leau (1907): *Les nouvelles langues internationales*. Paris: Couturat
- Couturat, Louis; Léopold Leau (1903+1907): [Faksimilo de la libroj (1903) kaj (1907).] – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Couturat, Louis; Léopold Leau (1979): *Histoire de la langue universelle. Les nouvelles langues internationales*. [Represo de la libroj (1903) kaj (1907).] Hildesheim/New York: Olms
- Davies, Alan (1999): *An introduction to applied linguistics*. 2-a eld. 2007. Edinburgh: Edinburgh University Press – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Décimo, Marc (2012): “À propos de l’aventure de La Tribune des Linguistes (1854-1860): utopie et dépassement.” *Dossiers d’Histoire Épistémologie Langage* [5], apartaj paĝnombroj – [http://htl.linguist.univ-paris-diderot.fr/media/num5/articles/decimo\\_2012.pdf](http://htl.linguist.univ-paris-diderot.fr/media/num5/articles/decimo_2012.pdf) (17.09.2018)
- Descartes, René (1629): “Descartes à Mersenne. Amsterdam, 20 novembre 1629.” René Descartes (1897): *Œuvres de Descartes. Correspondance I*. Charles Adam, Paul Tannery (red.). Paris: Cerf, 76–82 – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Drezen, Ernest (1931): *Historio de la mondolingvo*. Leipzig: Ekrelo – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Дуличенко, Александр Дмитриевич (1982): “Интерлингвистика.” Александр Дмитриевич Дуличенко (red.): *Актуальные проблемы интерлингвистики*. (Interlinguistica Tartuensis 1.) Tartu: Ülikool, 68–93 – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica\\_1\\_1982.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica_1_1982.pdf) (17.09.2018)
- Дуличенко, Александр Дмитриевич (1984): “Обзор важнейших интерлингвистических исследований в СССР.” Александр Дмитриевич Дуличенко (red.): *История и современное состояние интерлингвистики*. (Interlinguistica Tartuensis 3.) Tartu: Ülikool, 3–39 – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25445/interlinguistica\\_3\\_1984.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25445/interlinguistica_3_1984.pdf) (17.09.2018)
- Дуличенко, Александр Дмитриевич (1990а): “Языкотворчество как (интер)лингвистическая проблема.” Александр Дмитриевич Дуличенко (red.): *Интерлингвистическое конструирование и языковые реформы*. (Interlinguistica Tartuensis 7.) Tartu: Ülikool, 10–28 – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25291/interlinguistica\\_7\\_1990.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25291/interlinguistica_7_1990.pdf) (17.09.2018)

- Дуличенко, Александр Дмитриевич (1990b): *Международные вспомогательные языки*. Таллинн: Валгус – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/29085/dulitsenko\\_mezdunarodnyje.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/29085/dulitsenko_mezdunarodnyje.pdf) (17.09.2018)
- Eco, Umberto (1968): *La struttura assente*. Milano: Bompiani – adaptita traduko de Jürgen Trabant: Umberto Eco: *Einführung in die Semiotik*. [1-a eld. 1972.] 5-a eld. 1985. München: Fink
- Eco, Umberto (1993): *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea*. Roma/Bari: Laterza – traduko de Burkhart Kroeber: Umberto Eco (1994): *Die Suche nach der vollkommenen Sprache*. München: Beck
- Fiedler, Sabine (1999): *Plansprache und Phraseologie*. Frankfurt am Main k. a.: Lang
- Fiedler, Sabine (2006): “Standardization and self-regulation in an international speech community: the case of Esperanto.” Christiane Meierkord (red.): *The sociolinguistics of lingua franca communication*. (International Journal of the Sociology of Language [177].) Berlin k. a.: Mouton de Gruyter, 67–90
- Gardt, Andreas (1999): *Geschichte der Sprachwissenschaft in Deutschland*. Berlin/New York
- Gordin, Michael D. (2015): *Scientific Babel*. Chicago/London: University of Chicago Press – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Guérard, Albert Léon (1922?): *A short history of the international language movement*. New York: Boni and Liveright – <http://www.autodidactproject.org/other/guarard1.pdf> (17.09.2018)
- Harrison, Richard K. (1992): Bibliography of planned languages (excluding Esperanto). 10-a eld. 2002. – <http://www.rickharrison.com/language/bibliography.html> (10.01.2007, retadreso ne plu aktiva)
- Henricy, Casimir (1858a): “Société Internationale de Linguistique. Premier rapport du Comité de la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 17–39 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1858b): “Société Internationale de Linguistique. Deuxième rapport du Comité de la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 65–105 + 129–169 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1858c): “Avis important.” *La Tribune des Linguistes* 1: 40 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1859a): [Respondo al Letellier 1859a.] *La Tribune des Linguistes* 1: 453–454 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1859b): “Extrait d’un procès-verbal servant de complément aux rapports du Comité de la Langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 238–240 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1859c): “La langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 289–296 + 337–345 + 385–394 + 433–445 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1859ç): “Observations sur la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 481–487 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1859d): [Rimarkoj pri Sotos Ochando 1859b.] *La Tribune des Linguistes* 1: 536 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Henricy, Casimir (1860): “La langue universelle. Réponse à M. Letellier (de Caen).” *La Tribune des Linguistes* 2: 106–115 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Jacob, Henry (1947): *A planned auxiliary language*. London: Dobson – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Jeandillou, Jean-François (1997): “Métadiscours et enseignement d’une langue artificielle.” *Linx* [36]: 157–166 – [https://www.persee.fr/doc/AsPDF/linx\\_0246-8743\\_1997\\_num\\_36\\_1\\_1464.pdf](https://www.persee.fr/doc/AsPDF/linx_0246-8743_1997_num_36_1_1464.pdf) (17.09.2018)
- Jespersen, Otto (1928): *An international language*. London: George Allen & Unwin – represo 2007. Abingdon: Routledge
- Jossinet, Roland (1998): “La franca savinto de Esperanto: Louis de Beaufront.” *Franca Esperantisto* [498]: 42–48 – <http://archive.is/y08i> (17.09.2018)
- Kamman, William F. (1942): “The problem of a universal language.” *The Modern Language Journal* 26 [3]: 177–182

- Klare, Johannes (2010): “André Martinet (1908–1999) – Ein bedeutender französischer Linguist und Interlinguist des 20. Jahrhunderts.” Sabine Fiedler (red.): *Die Rolle von Persönlichkeiten in der Geschichte der Plansprachen*. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 17.) Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 9–37 – [http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/17/Klare\\_9-37.pdf](http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/17/Klare_9-37.pdf) (17.09.2018)
- Koerner, E. F. K. (1976): “A minor figure in 19th-century French linguistics: A. Dufriche-Desgenettes.” *Phonetica* 33: 222–231 – reaperigo: E. F. K. Koerner (1978): “A minor figure in 19th-century French linguistics: A. Dufriche-Desgenettes.” E. F. K. Koerner: *Toward a history of linguistics*. Amsterdam: Benjamins, 127–136
- Кузнецов, Сергей Николаевич (1976): “К вопросу о типологической классификации международных искусственных языков.” М. И. Исаев, В. П. Григорьев, С. Н. Кузнецов, В. Э. Сталмане (red.): *Проблемы интерлингвистики*. Москва: Наука, 60–78 – <https://www.booksite.ru/fulltext/interling/text.pdf> (17.09.2018)
- Кузнецов, Сергей Николаевич (1982): “О предмете и подразделениях интерлингвистики.” Александр Дмитриевич Дуличенко (red.): *Актуальные проблемы интерлингвистики*. (Interlinguistica Tartuensis 1.) Tartu: Ülikool, 15–37 – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica\\_1\\_1982.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica_1_1982.pdf) (17.09.2018)
- Кузнецов, Сергей Николаевич (1987): *Теоретические основы интерлингвистики*. Москва: Издательство Университета дружбы народов
- Кузнецов, Сергей Николаевич (1991): “Краткий словарь интерлингвистических терминов.” М. И. Исаев (red.): *Проблемы международного вспомогательного языка*. Москва: Наука, 171–228
- Lafargue, Georges (1904): “Nécessité de l’adoption d’une langue auxiliaire internationale.” *La Revue occidentale philosophique, sociale et politique* 30: 48–60 + 155–174 – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Large, Andrew (1985): *The artificial language movement*. Oxford: Blackwell
- Letellier, C.-L.-A. (1852): *Cours complet de langue universelle*. Parto 1. Caen: Laporte
- Letellier, C.-L.-A. (1859a): “Première lettre sur la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 446–453 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Letellier, C.-L.-A. (1859b): “Deuxième lettre sur la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 496–503 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Ley, Martin (2005): *Kontrollierte Textstrukturen*. Doktora disertaĵo. Gießen: Justus-Liebig-Universität – <http://geb.uni-giessen.de/geb/volltexte/2006/2713/pdf/LeyMartin-2006-01-30.pdf> (17.09.2018)
- Лихтгейм, А. М. (1982): “Языковые универсали как основа построения планового языка.” Александр Дмитриевич Дуличенко (red.): *Актуальные проблемы интерлингвистики*. (Interlinguistica Tartuensis 1.) Tartu: Ülikool, 50–67 – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica\\_1\\_1982.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/25290/interlinguistica_1_1982.pdf) (17.09.2018)
- Maat, Jaap (2004): *Philosophical languages in the seventeenth century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz*. (The New Synthese Historical Library 54.) Dordrecht/Boston/London: Kluwer
- Maat, Jaap; David Cram (2000): “Universal language schemes in the 17th century.” Sylvain Auroux, E. F. K. Koerner, Hans-Josef Niederehe, Kees Versteegh (red.): *Geschichte der Sprachwissenschaften*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 18.1.) Berlin/New York: de Gruyter, 1030–1043
- Maistre, Joseph de (1821): *Les soirées de Saint-Petersbourg*. 7-a eld. 1854. Vol. 1. Lyon/Paris: Pélagaud – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Mallet, Éd. (1904): “La langue auxiliaire internationale.” *Le Globe. Revue genevoise de géographie* 43: 77–83 – [https://www.persee.fr/docAsPDF/globe\\_0398-3412\\_1904\\_num\\_43\\_1\\_4896.pdf](https://www.persee.fr/docAsPDF/globe_0398-3412_1904_num_43_1_4896.pdf) (17.09.2018)
- Manders, Wilhelmus Johannes Arnoldus (1947): *Vijf kunsttalen*. Purmerend: Muusses
- Marlaud, Sarah (2013): “Les langues artificielles sont-elles des langues? Étude contrastive de l’espéranto et de la caractéristique universelle.” *Syntaxe et sémantique* [1/14]: 85–117 – <https://www.cairn.info/revue-syntaxe-et-semantique-2013-1-page-85.htm> (17.09.2018)
- Martinet, André (1946): “La linguistique et les langues artificielles.” *Word* 2 [1]: 37–47 – <https://www.tandfonline.com/doi/pdf/10.1080/00437956.1946.11659274> (17.09.2018)



- Meyer, Anna-Maria (2014): *Wiederbelebung einer Utopie. Probleme und Perspektiven slavischer Plansprachen im Zeitalter des Internets*. (Bamberger Beiträge zur Linguistik 6.) Bamberg: University of Bamberg Press – <https://d-nb.info/1058949594/34> (17.09.2018)
- Meyer, Anna-Maria (2016): “Slavische Plansprachen im Zeitalter des Internets.” Cyril Brosch, Sabine Fiedler (red.): *Plansprachen – Aspekte ihrer praktischen Anwendung*. (Interlinguistische Informationen, Beiheft 23.) Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 91–113 – <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/23/beiheft23-meyer.pdf> (17.09.2018)
- Moch, Gaston (1897a): Rapport sur la question de la langue internationale. VIII<sup>e</sup> Congrès universel de la paix. United Nations Office at Geneva, Archives: Congrès universels de la paix (1889-1914)
- Moch, Gaston (1897b): “La question de la langue internationale et sa solution par l’Esperanto.” *Revue internationale de sociologie* 5: 249–295 – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Moch, Gaston (1897c): La question de la langue internationale et sa solution par l’Esperanto. Apartajo. Paris: Giard & Brière – <https://www.onb.ac.at/bibliothek/sammlungen/plansprachen/digitale-medien/buecher/> (17.09.2018)
- Moch, Gaston (1905): “Rapport sur la question d’une langue auxiliaire internationale.” *Bulletin officiel du XIV<sup>e</sup> Congrès universel de la Paix tenu à Lucerne du 19 au 23 septembre 1905*. Berne: Bureau International de la Paix, 163–177
- Moigno, F. (1859): “Appréciation du projet de langue universelle de M. Bonifacio Sotos Ochando par le journal scientifique *Cosmos*.” *La Tribune des Linguistes* 1: 279–285 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Monnerot-Dumaine, Marcel (1960): *Précis d’interlinguistique générale et spéciale*. Paris: Maloine
- Moret, Sébastien (2004): “D’un vice caché vers une nouvelle conception de la langue: les langues artificielles et la linguistique.” *Cahiers Ferdinand de Saussure* [57]: 7–21
- Neis, Cordula (2009): “Universalsprache.” Gerda Haßler, Cordula Neis: *Lexikon sprachtheoretischer Grundbegriffe des 17. und 18. Jahrhunderts*. Berlin/Boston: de Gruyter, 790–836
- Noordegraaf, J. (1988): “Universele taal of universele grammatica? J. M[.] Hoogvliet en het Volapük.” *Voortgang* 9: 163–196 – [https://www.dbnl.org/tekst/voo004198801\\_01/voo004198801\\_01.pdf](https://www.dbnl.org/tekst/voo004198801_01/voo004198801_01.pdf) (17.09.2018)
- Renouvier, Charles (1855): “De la question de la langue universelle au XIX<sup>e</sup> siècle.” *La Revue* 2: 56–85 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Roelcke, Thorsten (2012): “Struktur, Linearisierung und Definitionen. Eine Studie zur terminologischen Konstituierung von Wortartensystemen in zwei grammatischen Darstellungen der deutschen Gegenwartssprache.” *trans-kom* 5 [1]: 1–28 – [http://www.trans-kom.eu/bd05nr01/trans-kom\\_05\\_01\\_01\\_Roelcke\\_Terminologisierung.20120614.pdf](http://www.trans-kom.eu/bd05nr01/trans-kom_05_01_01_Roelcke_Terminologisierung.20120614.pdf) (17.09.2018)
- Sakaguchi, Alicja (1983): “Zur Typologie der interlinguistischen Systeme.” János S. Petöfi (red.): *Texte und Sachverhalte*. (Papiere zur Textlinguistik 42.) Hamburg: Buske, 253–283
- Sakaguchi, Alicja (1987): “Welthilfssprache.” Ulrich Ammon, Norbert Dittmar, Klaus J. Mattheier (red.): *Sociolinguistics/Soziolinguistik*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 2.1.) Berlin/New York: de Gruyter, 365–370
- Sakaguchi, Alicja (1997): “Zur Ideengeschichte der morphologischen Natürlichkeitstheorie aus interlinguistischer Sicht.” *Sprachtypologie und Universalienforschung* 50 [4]: 296–307
- Sakaguchi, Alicja (1998): *Interlinguistik*. (Duisburger Arbeiten zur Sprach- und Kulturwissenschaft 36.) Frankfurt am Main: Lang
- Savatovsky, Dan (1989): “Les linguistes et la langue internationale, 1880–1920.” *Histoire Épistémologie Langage* 11 [2]: 37–65 – [https://www.persee.fr/docAsPDF/hel\\_0750-8069\\_1989\\_num\\_11\\_2\\_2297.pdf](https://www.persee.fr/docAsPDF/hel_0750-8069_1989_num_11_2_2297.pdf) (17.09.2018)



- Schmidt-Radefeldt, Jürgen (1998): “Plan- und Kunstsprachen auf romanischer Basis I. Allgemeine Problematik.” Günter Holtus, Michael Metzeltin, Christian Schmitt (red.): *Lexikon der Romanistischen Linguistik*. Vol. VII. Tübingen: Niemeyer, 680–686
- Schubert, Klaus (1989): “Interlinguistics – its aims, its achievements, and its place in language science.” Klaus Schubert kun Dan Maxwell (red.): *Interlinguistics – aspects of the science of planned languages*. (Trends in Linguistics, Studies and Monographs 42.) Berlin/New York: Mouton de Gruyter, 7–44
- Schubert, Klaus (1993): “Semantic compositionality: Esperanto word formation for language technology.” *Linguistics* 31: 311–365 – <https://doi.org/10.1515/ling.1993.31.2.311> (17.09.2018)
- Schubert, Klaus (2001): “Gestaltete Sprache. Plansprachen und die regulierten Sprachen der internationalen Fachkommunikation.” Klaus Schubert (red.): *Planned languages: From concept to reality*. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 223–257
- Schubert, Klaus (2007): *Wissen, Sprache, Medium, Arbeit*. (Forum für Fachsprachen-Forschung 76.) Tübingen: Narr – <http://d-nb.info/1045615382/34> (17.09.2018)
- Schubert, Klaus (2009): “Kommunikationsoptimierung. Vorüberlegungen zu einem fachkommunikativen Forschungsfeld.” *trans-kom* 2 [1]: 109–150 – [http://www.trans-kom.eu/bd02nr01/trans-kom\\_02\\_01\\_06\\_Schubert\\_Kommunikationsoptimierung.20090721.pdf](http://www.trans-kom.eu/bd02nr01/trans-kom_02_01_06_Schubert_Kommunikationsoptimierung.20090721.pdf) (17.09.2018)
- Schubert, Klaus (2011a): “Zum bewussten Eingreifen in die Sprache.” Cyril Brosch, Sabine Fiedler (red.): *Florilegium Interlinguisticum*. Frankfurt am Main u. a.: Lang, 47–60
- Schubert, Klaus (2011b): “Optimierung als Kommunikationsziel: Bessere Sprachen.” Klaus-Dieter Baumann (red.): *Fach – Translat – Kultur*. (Forum für Fachsprachen-Forschung 98.) Berlin: Frank & Timme, 363–392
- Schubert, Klaus (2015): “‘so gewiß muß es auch eine Uebersetzungswissenschaft geben’. Erweiterte Recherchen zur ersten Forderung nach einer wissenschaftlichen Beschäftigung mit dem Übersetzen.” *trans-kom* 8 [2]: 560–617 – [http://www.trans-kom.eu/bd08nr02/trans-kom\\_08\\_02\\_12\\_Schubert\\_Pudor3.20151211.pdf](http://www.trans-kom.eu/bd08nr02/trans-kom_08_02_12_Schubert_Pudor3.20151211.pdf) (17.09.2018)
- Schubert, Klaus (2017): “Gestaltete Sprachen – neue Aufgaben für die Interlinguistik?” Cyril Brosch, Sabine Fiedler (red.): *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2017*. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag, 87–98 – <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2017/JGI2017-schubert.pdf> (17.09.2018)
- Schubert, Klaus (2018): “Apriorische und aposteriorische Plansprachen – eine Quellenrecherche.” Cyril Brosch, Sabine Fiedler (red.): *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2018*. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag, 105–132 – <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2018/JGI2018-Schubert.pdf> (29.11.2018)
- Schuchardt, Hugo (1904): “Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung.” *Almanach der kaiserlichen Akademie der Wissenschaften* 54: 281–296 – reaperigo: Hugo Schuchardt (1976): “Bericht über die auf Schaffung einer künstlichen internationalen Hilfssprache gerichtete Bewegung.” Reinhard Haupenthal (red.): *Plansprachen*. (Wege der Forschung 325.) Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft, 46–58
- Slaughter, Mary M. (1982): *Universal languages and scientific taxonomy in the seventeenth century*. Cambridge k. a.: Cambridge University Press
- Sotos Ochando, [Bonifacio] (1859a): “Lettre au directeur de la Tribune.” *La Tribune des Linguistes* 1: 455–456 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Sotos Ochando, [Bonifacio] (1859b): “Essai de nomenclatures chimiques conformément au projet de langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 488–495 + 529–536 – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- Sotos Ochando, [Bonifacio] (1859c): “Essai de nomenclatures scientifique des végétaux conformément au projet de langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 581–587 – <https://books.google.de> (17.09.2018)

- Strasser, Gerhard F. (1989): “Lingua realis, lingua universalis und lingua cryptologica: Analogiebildungen bei den Universalsprachen des 16. und 17. Jahrhunderts.” *Berichte zur Wissenschaftsgeschichte* 12: 203–217 – <https://s3.amazonaws.com/> (17.09.2018)
- Suchowolec, Karolina (2018): *Sprachlenkung – Aspekte einer übergreifenden Theorie*. (Sprachwissenschaft 38.) Berlin: Frank & Timme – [http://frank-timme.de/fileadmin/docs/Suchowolec\\_Sprachlenkung.pdf](http://frank-timme.de/fileadmin/docs/Suchowolec_Sprachlenkung.pdf) (17.09.2018)
- Szilágyi, Dénes (1931): “Versus interlinguistica.” *Schola et Vita* 6: 97–120 – reaperigo: Dénes Szilágyi (1976): “Versus interlinguistica.” Reinhard Haupenthal (red.): *Plansprachen*. (Wege der Forschung 325.) Darmstadt: Wissenschaftliche Buchgesellschaft, 163–187
- Tauli, Valter (1968): *Introduction to a theory of language planning*. (Acta Universitatis Upsaliensis, Studia Philologiae Scandinavicae Upsaliensia 6.) Uppsala: Almqvist & Wiksell
- La Tribune des Linguistes* 1 (1858–1859). – <https://books.google.de> (17.09.2018)
- La Tribune des Linguistes* 2 (1859–1860). – <https://download.digitale-sammlungen.de/pdf/1535096137bsb10583204.pdf> (17.09.2018)
- Verloren van Themaat, Willem Anthony (1962): “Formalized and artificial languages.” *Synthese* 14 [4]: 320–326 – <http://dx.doi.org/10.1007/BF00869312> (17.09.2018)
- Vikør, Lars (2004): “Lingua franca and international language/Verkehrssprache und internationale Sprache.” Ulrich Ammon, Norbert Dittmar, Klaus J. Mattheier, Peter Trudgill (red.): *Sociolinguistics/ Soziolinguistik*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 2.1.) 2-a eld. 2004. Berlin/New York: de Gruyter, 328–335
- Waringhien, Gaston (1980): *1887 kaj la sekvo... Eseoj IV*. Antverpeno: tk/La Laguna: Stafeto
- Wilkins, John (1641): *Mercury: or the secret and swift messenger*. 2-a eld. 1694. London: Baldwin – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Wilkins, John (1668): *An essay towards a real character and a philosophical language*. London: Gellibrand & Martyn – <https://archive.org/> (17.09.2018)
- Wüster, Eugen (1931): *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik*. 2-a eld. 1966. (Sprachforum, Beiheft 2.) Bonn: Bouvier
- Wüster, Eugen (1955): “La terminoj ‘esperantologio’ kaj ‘interlingvistiko’.” *Esperantologio* 1: 209–214

## Aŭtoro

Klaus Schubert estas profesoro pri aplika lingvistiko/internacia faka komunikado en la Universitato de Hildesheim (Germanio). Antaŭe li laboris kiel socilingvisto en la Universitato de Kiel (Germanio), kiel komputa lingvisto kaj projektestro en la programarentrepreno BSO/Buro voor Systeemontwikkeling BV, sekcio BSO/Research en Utrecht (Nederlando), kiel konsilisto ĉe BSO/Language Technology BV en Baarn (Nederlando) kaj kiel profesoro pri komputa lingvistiko kaj teknika tradukado en la Faka Universitato de Flensburg (Germanio).

Retpoŝto: [klaus.schubert@uni-hildesheim.de](mailto:klaus.schubert@uni-hildesheim.de)

Retejo: <http://www.uni-hildesheim.de/index.php?id=schubert>